

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 544 (3) MARTO 1951



Foto : Jules Henriot et Fils, Quimper

Bretonaj ceramikoj (*vidu p. 69*)



El la Oficejo

Nia adresoj : Pluraj korespondantoj petis klarigon pri la vortoj en nia adresoj. *Heronsgate* estas parto de la urbo *Rickmansworth*; *Herts.* estas mallongigo de *Hertfordshire*, graflando en kiu la urbo troviĝas.

Afranko : La afranko por eksterlandeniraj leteroj lastatempe plialtiĝis je triono. Kun leteroj postulantaj respondon aldoni de respondkuponon multe helpus je limigo de la alta kosto de afranko. Eĉ britoj povus multe helpi per aldoni de poŝtmarko. Antaŭdankon.

Kovrilo de januara numero : Kelkaj malaprobis la koloron de la kovrilo por januaro. Pro nelivero de la mendita papero la elekto estis limigita. Ni tamen volas atentigi, ke la koloro de la papero difinas la helon de la tonoj en la fronta bildo. Iuj—krom ni—opinias, ke la grizo de la papero konvene reliefigas la detalojn de la arkitekturo, kaj estas tre taŭga por tiu specifa foto.

Jarlibro : La jarlibro eldoniĝis en la fruaj tagoj de februaro. Se ĝi ankoraŭ ne atingis vin, sciigu la Centran Oficejon.

Formato de februara n-ro : Proeraro ĉe la presisto iuj ekzempleroj de ĉi tiu numero ne estis tranĉitaj je la ĝusta formato. Ni deziras esprimi nian bedaŭron pro tio. Tiuj kiuj eventuale bindigos la jarkolekton tamen povos instrukcii pri konforma tranĉado supre kaj malsupre.

44a Jaro

Marto 1951

N-ro 544 (3)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6	½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil.	⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respondkuponon por ĉiu duoj da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 544 (3)

Marto 1951



La urbo de la 36-a Kongreso

Kia ĝi estis ?

Kia ĝi estas,

Kia ĝi estos ?

INTER la universitataj urboj germanaj iuj havas apartan karakteron, ĉu romantikan kiel Heidelberg, ĉu aristokrat-distingan kiel Bonn, ĉu artecan kiel München ; ĉar München estis centro de artistoj en pentro, literaturo kaj muziko. Distingaj nomoj ligiĝas al tiu ĉi urbo kaj al la reginta familio Wittelsbach inter kies anoj pluraj ne nur estis mecenatoj larĝanimaj, sed ankaŭ homoj kun vastaj interesoj pri la scienco kaj la arto.

Ateno de la Isar oni nomis la urbon pro ĝiaj multaj konstruaĵoj novklasikaj, rezulte de la *filhelenismo* (grekamikeco) de reĝo Ludoviko I (kies filo Otto estis unua greka reĝo post la liberiĝo el la turka jugo). Inter granda aro da vidindaĵoj, el la listo de muzeoj, ni memoru nur la malnovan kaj la novan, *Pinakothek*, la *Glyptothek*, la Vitran Palacon, la *Maximilianeum*, la Nacian Muzeon kaj la *Deutsche Museum*. Kiom alloga estis la epoko en kiu vivis tie la pentristoj Spitzweg, Lenback, Hans von Marées, Lovis Corinth, Hans Thoma, Moritz von Schwind,

epoko kiu finiĝis kun la deknaŭa jarcento !

München estis en konstanta opozicio kontraŭ la centralismaj-nivelismaj tendencoj disrariantaj el la germana ĉefurbo. Esprimon trovis ĉi tiu opozicio en unu el la plej legataj periodaĵoj, *Simplizissimus*, miksaĵo de artkritika, literatura, politiko-kritika, satira revuo ilustrita, multfoje konfiskita de la polico pro ĝia senbrida kritikado. Paralelis ĝin la *Jugend*, arta-literatura revuo, kiu malfermis siajn kolonojn precipe al modernaj verkistoj aliloke rifuzitaj.

“Bavaroj brasas* bonan bieron”, la nacian trinkaĵon germanan, kaj kiel oni ŝerce diras, *la lakto bavara*. Nu, ĉiu kiu venis por vidi aŭ resti en la ĉefurbo de la biero nepre vizitis la *Hofbräuhaus*—vorto iom malfacile prononcebla por nesamlingvanoj. Ĝi signifas *Kortega Bierfarejo*. Tio estas vastega restoracio tuĥe unika. Mendi en tiu ĉi ejo mineralakvon en pasinta epoko vekis sensacion inter la gastoj. Regis tie sentimentala intimeco

* brasas=faras

esprimata per la vorto *Gemütlichkeit*, eco kiu trovis sian kulminon en la ĉiujara Karnavalfesto kaj en la Oktobra Festo. Artista atmosfero, serioz-facilanima, komparebla al viro kun unu okulo ploranta kaj la alia ridetanta samtempe. La urba blazono montras knabinon en monakina vesto, la faman *Münch'ner Kindl* (Münchena Infano). Dum la tempo de la karnavalo la plimulto de la loĝantoj ŝajnis infanoj, gajaj, senzorgaj, amuziĝemaj.

Tia estis München! La opozicio kontraŭ la nordo, deveninta el multaj kaŭzoj, parte pravaj, parte tro-grandigitaj, faciligis al politikaj aventuroj radikiĝi.

München, urbo gaja kaj arteca estas parte detruita, riĉaj muzeoj, interesaj konstruaĵoj malaperis. Kiel miraklo povas esti rigardata tio, ke restas la *Frauenkirche* (Preĝejo de Nia Sinjorino) la eklezia blazono de la urbo, kaj plie la kreaĵo de Oskar von Müller la *Deutsche Museum* (por ne erarigi ni citas la germanlingvan

nomon ĉar ekzistas alia muzeo en Nürnberg kies nomo estas *Germanische Museum*). Pri tiu ĉi muzeo, pri ĝia koncepto, ĝia gvida ideo kaj ĝia realigo utilis skribi kelkpaĝan artikolon. Ĝi gastigos la 36-an kongreson kaj donos al ĝi tute apartan kadron. Kiu vidis München en 1945 kaj revenas nun, ses jarojn poste, povas nur miri pri la konsiderinda ŝanĝiĝo. Kio ŝajnis neebla, jam estas realaĵo kaj oni pensas je la vortoj de Schiller:

“... kaj nova viv' ekfloras el ruinoj!”

Tia estas München nuntempe. Danke al usona helpo grandskala, kun la volo neperei flanke de la germana popolo, Germanujo restariĝos kaj estos denove faktoro ĉiasfera, kiun oni ne povos preteratenti. Estas atendeble, ke la diverseco de la germanaj triboj favore influos la novan kulturan elvolviĝon. El tio gajnos nia movado, kaj München estos ĝia centro en Germanujo.

Tia estos München estontece.

H.J.

Serioza Samideano legas plurajn E.-gazetojn

FRANCA ESPERANTISTO

plaĉas pro sia nova poŝformato, pro originalaj artikoloj kaj tradukaĵoj el la franca literaturo.

Abonebla ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth (Herts.) aŭ ĉe naciaj E-organizaĵoj.

Jarabono ek de iu ajn monato en la jaro: Prezo 450 fr. fr. · Prezo pere de U.E.A.: 9 ŝil.



Tra la Mondo Esperantista



Nova prelegvojaĝo de Prof. I. Lapenna

Inte! la 15-a de Januaro kaj Pasko Prof. D-ro Ivo Lapenna, Estrarano de U.E.A. pri kongresoj kaj propagando, vizitas Italujon, sudan Francujon, Belgujon kaj Nederlandon por persone kontakti la landajn kaj lokajn gvidantojn de nia movado kaj por prezenti la aferon de I.L. precipe en la universitatoj kaj altlernejoj. Antaŭ la kongreso en Munkeno li vizitos ankaŭ Germanujon. Pri la rezultoj de tiu nova laboro de U.E.A. sur la kampo de disvastigo de Esperanto, aperos koncizaj raportoj en nia revuo.

Eventualajn leterojn por D-ro Lapenna, sed nur vere gravajn kaj urgajn, bonvolu adresi al la C.O., kiu plusendos ilin al la loko en kiu li troviĝos.

Aŭstrujo

Skoltismo : D-ro Adolf Halbedl, agento de Skolta Esperantista Ligo en Aŭstrujo atentigas skoltojn kaj skoltamikojn, ke okazos nunjare la ĵamboreo apud Bad Ischl, konata banloko. Oni petas, ke skoltoj kaj aliaj sin turnu al skoltestroj en ĉiuj landoj por atentigi pri Esperanto. Utilajn informojn pri la ĵamboreo oni povas ricevi de la organiza komitato : *Pfadfinder Österreichs*, Schloss Schöbrunn, Westtrakt, Wien XIII.

Brazilo

Semajno de Zamenhof : En Recife, Rio de Janeiro kaj Belo Horizonte

Esperantistoj festis de la 10-a ĝis la 16-a de decembro 1950 la memoron de la Majstro per *Semajno de Zamenhof*. Okazis multaj radioprogramoj, solenaj kunsidoj, paroladoj, kantoj, muziko, ekspozicio de Esperantaĵoj, gazet-artikoloj dum la semajno kaj en la mateno de dimanĉo la 17-a oni solene inaŭguris en la ĉefurbo de Minas Gerais monumenton de Zamenhof. Tio estas granda busto el bronzo sur alta piedestalo el blanka marmoro kaj ĝi staras sur bedo en formo de kvin-penta stelo en la ĝardeno de Placo Esperanto. D-ro Carlos Rezende, prezidanto de la Esperanto-Asocio de Minas Gerais, oficiale transdonis al la komunumo de Belo Horizonte la belan monumenton en la nomo de la Esperantistoj. Urbestro Negrão de Lima per bela parolado pri la idealo de Esperanto ĝin akceptis en la nomo de la urbo.

Bulgarujo

Pliampleksigo de radio-dissendoj : Radio Sofia anoncas dissendojn en Esperanto trifoje en la semajno, marde, vendrede kaj dimanĉe. Vidu detalojn sur *Radio-paĝo*. Oni donos informojn pri la politika, kultura kaj ekonomia vivo de la bulgara popolo.

Francujo

Vintra renkontiĝo : La skirenkontiĝo antaŭe anoncita okazis laŭ plano en Méribel-les-Allues en la francaj alpoj je 24 dec.–1 jan. sub gvidado de G.E.E. Nur modesta nombro partoprenis, sed la ĝuo estis tia, ke oni

antaŭvidas similan aranĝon en la venonta vintrosezono. Informoj ĉe: Bidoit Edmond, Cours Complementaire, Suippes, Marne, Francujo.

Kongreso: La landa kongreso de U.E.F. okazos en Lyon, 12, 13, 14 de majo 1951. Detaloj ankoraŭ mankas.

Italujo

Internacia Foiro: Okaze de la 53-a Internacia Foiro de Verona, specialaĵo pri Terkulturado kaj Brutoj, la tieaj samideanoj pretigos standon kiel informojn. La dato estas: 11-20 marto 1951. Eventualajn petojn pri informo direktu en Esperanto al: Verona Foiro, Esperanto-Oficejo, Cas. Post. 199, Verona, Italujo.

U.E.A. en la radio: Dimanĉon la 4-an de februaro la itala radio dissendis sian *Esperanto-gazeton* en kiu oni parolis laŭde al U.E.A. kaj ĝiaj servoj. Karlo Minnaia, filo de la ĉefdelegito de U.E.A. en Italujo, dolĉe kaj ĉarme deklamis poemon en Esperanto.

Nederlando

Nederlandanoj kaj flandroj kongresos kune. La 16-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista kaj la 18-a Kongreso de L.E.E.N. okazos je Pentekosto en Hilversum. Informojn ĉe: F-ino S. Visser, Galileistr. 42, Hilversum.

Panteono de Esperanto

Je 20-a de majo oni inaŭguros en la Ronda Salonego de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien *Panteonon de Esperanto*, kie la geesperantistoj por eterna tempo povos gardi la memoron de la Majstro L. L. Zamenhof kaj la pioniroj de la Esperanto-movado, ĉu mortintaj, ĉu ankoraŭ vivantaj.


Oni invitas la geesperantistojn de la tuta mondo al ĉi tiu festaranĝo (Detalojn legu en la novaperinta *Informilo de IEMW*, ricevebla senpage por la subtenantaj kaj dumvivaj membroj de la Esperanto-muzeo). Por nemembroj la prezo estas 1 respondkuponon.

La granda portreto de Zamenhof estis ruinigata de la Germanoj en 1938 kaj oni urĝe bezonas grandan portreton kaj buston de la Majstro. Kiu volas donaci (aŭ prunti) al la Panteono tiajn portreton kaj buston?

Ĉiajn korespondaĵojn direktu ne al personoj, sed al: Internacia Esperanto-Muzeo en Wien I, Hofburg, Batthyanystrasse, Aŭstrujo. Al petoj aldonu respondafrankon!

Festo de Britujo 1951

Vidu Britujon per aŭtomobilo
Aŭtoj lueblaj sen ŝoforo



Petu broŝuron (anglalingvan)
de:—


Park Gates Service Station Ltd.,
1 Fernside Road, Poole,
Bournemouth, Anglujo

Eksterlandaj vizitantoj
specialaĵo nia

Ch. Le Seac'h :

La Bretona Ceramiko

LA urbo Quimper (bretonlingve *Kemper*) certe estas vizitinda pro siaj malnovaj kvartaloj, sia impona ogivstila katedralo, kaj sia "monto Frugy" kies fagoj speguliĝas en la rivero Odet, la plej beleta rivero en Francujo, kiel certigas la gvidlibroj !



Tamen Quimper verŝajne nun estas plej konata pro sia fajenc-fabrikado. Tiu industrio naskiĝis kaj prosperis en la antikva antaŭurbo Loc Maria. Oni diras, ke ĝi naskiĝis en Romo !

En Romo ?

Jes. Tamen tio estas nur duonŝerco.

Dum kaj antaŭ la deksepa jarcento en Loc Maria ekzistis tri kafejaĵoj : *Venecio*, *Napolo* kaj *Romo*. Tiuj diboĉlokoj vere kaŭzis la malesperon de la kempera polico kaj de multaj edzinoj ! Ĉar multaj viroj—kun virinoj kompreneble—en tiuj gorg-tranĉejoj grandparte elspezis sian salajron kaj revenis hejmen kun malplena monujo, sed kun la oreloj varmaj !

Kion do faris la polico ? Ho ve ! Ĝi estis tute senpova. Tiu parto de Loc Maria, kiel eĉ hodiaŭ, ne apartenis al Quimper sed al Ergué Armel. Oni do povis sentime trinki, drinki, ebriiĝi, brui, batali tiom kiom oni volis, kaj moki pri la polico !

Feliĉe en 1686 el Provenco venis al Loc Maria iu viro nomita Baptiste Bousquet. Li aĉetis la trian malbenindan lokon. Rompante kun la malnova tradicio, li forigis la kabaredon kaj anstataŭigis ĝin per potfabrikejo, kiu rapide prosperis.

Similaj entreprenoj baldaŭ naskiĝis, kreskis, kaj Loc Maria fariĝis la centro de nova industrio.

Nova ? Tamen ne tute, ĉar verdire jam de tre longe, tre longe antaŭ Bousquet, oni kredeble modelis kaj bakis argilon en la tuta ĉirkaŭa o de Quimper. Ekzemple antaŭ tri jaroj, fosante la teron por konstrui novan fajencfabrikejon, oni subite ektrovis poton, funebran urnon, kun en ĝi cindroj, bruligitaj ostoj. La ŝoveliloj baldaŭ malkovris duan, trian kaj dekojn da similaj ujoj, kaj ĉiuj enhavis multege da diversaj objektoj, armiloj, juveloj, el ĉiuspecaj materialoj. Eĉ kombilon el buksligno oni trovis !

Krom kelkaj vazoj, la kompetentuloj certigis, ke ĉi tiuj estis faritaj el la sama argilo, kiun oni nun uzas en Loc Maria, tiu de la argilminejo de Toulven, 7 km. sude de Quimper. Ĉu tio tamen pravas la antikvecon de tiuj eltrovaĵoj? Jes, ĉar oni trovis en unu el la vazoj medalojn kun la nomo de la imperiestro roma Nerva (91–98 p.K.). La Romanoj do en tiu loko Creac'h Maria enterigis siajn mortintojn, kiujn ili antaŭe bruligis.

Oni povas eĉ certigi, ke la unuaj romaj invadintoj venis ĉi tien en 53 a.K. post la memorinda marbatalo kontraŭ la Venetoj, tiu brava popolo, kiu loĝis ĉe kaj ĉirkaŭ tiu kvazaŭ fermita golfo Morbihan, kie ili povis facile kaŝi sin kaj sendanĝere batalminaci siajn malamikojn. Ilia nomo ankoraŭ nun estas rekonebla en la nomo de la urbo Gwened (franclingve Vannes).

La Romanoj do venis, vidis, venkis — sed ne senpene. La enfluo ilin alportis, sed la elfluo ilin ne forportis !

Ili restis, restadis. La loko al ili sendube plaĉis. Ĝi ja estas bela ! Sur la loko mem, kien la tajdo haltigis ilin, ili elŝipiĝis kaj konstruis novan urbeton kun la nomo *Civitas Aquilonia*, la nunan Loc Maria.

Loc Maria, nia malgranda antaŭurbo, estas do pli malnova ol Quimper, pli ol Bretonujo, ol Francujo eĉ ! Kaj pli malnova ol la kristana tempo.

Ĝia sola industrio, la potarto, povas fieri pri tio, ke ĝi estas la plej antikva en Francujo, kaj ĝiaj nobelecliteroj pli ol dumiljaraĝaj !

Certe oni nuntempe ne laboras laŭ la malnovaj metodoj. Oni jam ne bruligas kiel antaŭ longe branĉaĵojn aŭ fenditan lignon. Tamen vivas ankoraŭ maljunuloj, kiuj vidis la komencon de la hejtado per karboj, kaj kiuj antaŭ ol ĉesi labori, vidis la enkondukon de benzino kaj poste de elektro. La fumkolonoj, kiuj nigrigas nian ĉielon, verŝajne siavice malaperos ĉar la novaj uzinoj ne plu konstruas





kamenojn ! Tre certe estis por la vizitantoj multe pli pitoreske vidi kiel laboris la potistoj. Ili sidis ĉe turnilo, kiun ili movis perpiede. Estis interese vidi kiom rapide, dank' al la lerteco de la fingroj, tiu argilamaso kvaŝaŭ vivis, kreskis, larĝiĝis aŭ dikiĝis, fariĝante laŭ la volo de la laboristo, ĉu vazo, botelo, taso aŭ io ajn.

Nun ĉio fariĝas rapide kaj mekanike.

Certe, en la fabrikejoj laboras multaj anonimaj laboristoj, sed multaj artaĵoj nun estas subskribitaj de tre konataj artistoj. La listo estas tre longa : Kreston, Touilheu, Néheud, Bazin, Bachelet, Lenoir, Chankau, Lachaud. Quilivic, kiu jam vivigis la hersantan graniton, ankaŭ donis animon al la argilo.

La bretonaj ceramikoĵ tra la tuta mondo estas ŝatataj kaj admirataj.

Ili ofte estas imitataj, sed egalataj ne !

(La redakcio volas esprimi sian dankon al la entreprenoj : *Henriot*, Loc Maria ; *H.B.*, Loc Maria ; *Lucas* á Keraluc Creac'h Maria, Quimper, pro la fotoj disponigitaj al ni por ĉi tiu artikolo).

Internaciaj Feriaj Esperanto-Kursoj

en **Elsinoro**, Danlando, okazos
22-29 de julio.

Ni invitas vin partopreni.

Detala prospekto havebla ĉe

**L. Friis, Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando**

Mason Stuttard :

Kelkaj konsideroj pri redaktado

EN sia jarkunveno la novzelanda asocio akceptis rezolucion, en kiu troviĝis kelkaj rekomendoj direktitaj al U.E.A. Unu el ili tekstas: "Ke en nia oficiala gazeto oni nepre evitu neologismojn, kiel ekzemple la vorton *evento*, kiu aperis en lastatempa numero."

La aktiva intereso pri nia organo flanke de asocio estas aplaŭdinda kaj bonvena, kaj konstrua kritiko pri la revuo estas ĉiam dezirata. Mi volas per ĉi tiu artikolo nur atentigi pri kelkaj praktikaj fazoj de la problemo, pri kiuj evidente la rekomendintoj ne scias. Tio verŝajne interesos ankaŭ aliajn legantojn, ĉar en mia prelego pri la redaktado de *Esperanto* (farita antaŭ pluraj grupoj en Anglujo) mi konstatis viglan intereson pri tio.

Ni unue ekzamenu la ĉi-supran rekomendon. La unua afero estas, precizigi la difinon "neologismo". La vorto *evento* troviĝas en *Plena Vortaro* en la eldono de 1934 (mi ne povis kontroli, ĉu ĝi staris en la unua eldono de 1923); sed eĉ tio montras, ke la vorto ĝuas vivon de preskaŭ 20 jaroj, kredeble pli ĉar vortaro kutime registras la ekziston de vorto. Ĉu do vorto 20-jaraĝa estas neologismo en lingvo 63-jara? La vorto certe ne estas oficiala. Ĉu do ne aperu en *Esperanto* vortoj neoficialaj? Kia tasko kontroli tion! Kiu Esperantisto povas diri kun certo, sen konsulto de vortaro, kiuj radikoj estas oficialaj kaj kiuj ne? Rigardeto en P.V. tuj montras kiom da radikoj en ĉiutaga uzo ankoraŭ ne ĝuas oficialan sankcion! Insisto do pri forigo de vortoj, ĉu konforme al unu postulo,

ĉu al la alia, estus tute nerealeca, kaj mi tuj deklaras, ke neniu redaktoro kapablu daŭrigi sian taskon katenite per tiuj kondiĉoj.

Tamen la ĉefa implico de la rekomendo ne estas tuj rimarkebla de la laiko. Temas pri manuskriptoj enhavantaj "malaprobitajn" vortojn. Kiu verdiktu en tia okazo? Ĉu bona, valora, interesa artikolo de eminenta Esperantisto estu malakceptata pro ekzisto en ĝi de vortoj neaprobitaj de iu sekcio de la movado? Ni kutime interkonsultas kun kontribuintoj pri vortoj kaj konstruoj nekutimaj en nia organo kaj ĝis nun verkintoj montris simpatian kunlaboremon en tiu afero. Certe estas, ke neniu manuskripto ĝis nun estas malakceptita pro konflikto de opinio inter la redakcio kaj aŭtoro. Tia situacio tamen povus leviĝi. Redaktoro kun absoluta povo verdiktas kaj respondecas antaŭ neniu; sed ĉe oficiala organo ĉiuj instancoj estas respondaj antaŭ la membroj, kaj preskaŭ ĉiam la kontribuantoj al la revuo estas membroj!

Tiu supraĵa skizo malnete prezentas la problemojn ĉe redaktado de gazeto en la fako lingva. Pro tio, ke la rekomendo ignoras ilin, ŝajnas al mi, ke la rekomendo estas preskaŭ senvalora kiel praktika konsilo. Povas esti, ke legantoj kaj membroj havas opiniojn pri ĉi tiu delikata afero.

**Ĉu vi jam varbis unu
membron en 1951?**

K. Wilgenhof :

Eksperimenta Telepatio

ESTAS ofte konstatite, ke iu homo eksciis penson de alia homo sen kia ajn kôrpa rimedo. Evidente en tiuj okazoj senpera komunikiĝo ekzistis inter ambaŭ mensoj sen-depense de la sentumoj. La fenomeno fariĝis konata sub la nomo telepatio.

Dum la antaŭa jarcento telepatiaj fenomenoj altiris la atenton de sciencaj esloremluloj. Oni komencis kolekti raportojn pri tiaj koncernaj spertoj de multaj personoj. Precipe Anglaj esplorintoj Gurney, Myers kaj Podmore meritiĝis per siaj verkoj, en kiuj troviĝas riĉaj kolektoj da raportitaj kaj taŭge konfirmitaj aperaĵoj. Ili studis ne nur telepatiajn okazaĵojn, sed ankaŭ antaŭsciojn, ekstersentumajn perceptojn, spiritismon, animalan magnetismon k.s. Ĉiuj tiaj aferoj nun estas studobjektoj de la scienco **metapsikio**.

Telepatiaj kontaktoj estas diversaj. Kelkaj homoj tuj intuicie scias plurajn aferojn kaj travivaĵojn de persono, kiun ili renkontas la unuan fojon kaj pri kiu ili neniam antaŭe iam aŭdis. Estas kvazaŭ ili same facile ĉerpas el la memoro de la koncerna persono, kiel tiu mem. Multaj spertis ian vidan aŭ aŭdan impreson de parenco aŭ amiko, kiu trafiĝis en mortdanĝeran situacion aŭ kiu efektive mortis. Ankaŭ ekzemploj pri malpli emociigaj komunikoj ofte prezentiĝis. Kelkfoje okazis, ke du homoj intimaj inter si havas sonĝojn, kiuj tre intersimilas. El ĉi-lasto ni povas konkludi, ke ankaŭ dum dormo homoj povas telepatie interkontakti.

Nur rikolti raportojn pri telepatiaj kontaktoj, kiuj de tempo al tempo tie

kaj tie okazas, ne estas sufiĉe por scienca esplorado. Sciencistoj deziras koni faktojn, tio estas vera, sed ankaŭ klarigi ilin. Por tio lasta estas tre dezirinde, ke oni povu laŭvole kaj ripete estigi studindajn okazojn, do povu fari eksperimentojn. Tial jam en la plej frua tempo de la metapsikio oni klopodis aranĝi telepatiajn eksperimentojn por pruvi la ekziston (aŭ neekziston) de telepatio kaj trovi la leĝojn, kiuj difinas ĝin.

Kiel tia eksperimento estas aranĝata? Imagu, ke mi pensas pri la koncepto *kato* kaj invitas iun klopodi ekscii pri kio mi pensas. Supozu, ke li efektive diras: *kato*. Nun mi povas mire ĝoji pri la sukceso de mia malgranda eksperimento, sed neniu povas taksii la sciencan valoron de mia rezulto. Eble mi hieraŭ legis en ĵurnalo pri dombrulo estigita de kato, kiu renversis lampon kaj eble ankaŭ mia kunlaboranto dum la eksperimento estis leginta tion. Aŭ eble ni ambaŭ tre ŝatas katojn kaj ofte okupis nin pri tiuj bestoj. Ambaŭokaze la rezulto estas malpli rimarkinda.

Pro tio estas senkondiĉe necese, ke oni eliminu tian koincidon el telepatia eksperimento. Krome altrudas sin alia konsidero: ĉu la ĝusta respondo de la kunlaboranto ne estis hazarda?

Jen la du gravaj flankoj de la eksperimenta telepatio. Ili estas nepre atentendaj antaŭ ĉiu eksperimento kia ajn en tiu kampo. Se oni neglektas aŭ forgesas ilin, eĉ la plej elstara rezulto perdas sian valoron; ĉar kiom ajn esploristo kaj liaj kunlaborintoj estas konvinkitaj, ke la fenomenoj observitaj dum ilia

eksperimento estis vere telepatiaj, ili ne konvinkos aliajn, se ili ne zorgis elimini ĉiun eblon al alia klarigo de la rezulto, ol la telepatia.

La eblon de hazarda trafo oni neniam povas plene forigi. Post ĉiu sukcesinta transsendo de pensobjekto de unu persono al alia, kritikulo povas aserti, ke estis hazarde, ke la dua persono ekpensis ĝuste pri tio, kion la unua klopodis aperigi en lia menso.

Per tio la eksperimenta esplorado ŝajne implikiĝis en neelirebla embaraso. Sed ekzistas matematika fako, kiu povas helpi. Ĝi nomiĝas ŝanckalkulo kaj plua merito de Franca Nobelpremiito Richet estas, ke li unua aplikis ĝin en metapsikio. Ĝia principo estas sufiĉe simpla.

Imagu, ke vi sesdek fojojn ĵetas kubeton, kiu havas respektive la ciferojn unu ĝis ses sur siaj flankoj. Post ĉiu ĵeto unu el la ciferoj estas supra kaj pri tiu cifero nur per via pensado vi klopodas pri ĝi pensigi alian personon, kiu ne povas vidi la kubeton. Ĉiufoje oni demandas lin, kiu cifero venis en lian menson. Se li nur simple divenis, do ne telepatie akiris komunikon, la probabla ŝanco de ĝusta diveno estas unu el ses ĉe ĉiu ĵeto. Post sesdek fojoj la ŝancoj estas dek el sesdek.

Ni supozu, ke li dek ok fojojn diris la ĝustan ciferon. Tiukaze ni rajtas paroli pri ekzemplo de telepatio ĉar la ŝanco de dek ok ĝustaj divenoj estas treege malgranda. Por malpliigi tiun ŝancon, do plivalorigi la rezulton, ni povas daŭrigi la eksperimenton ĝis ni atingas la 600-an aŭ 6000-an fojon. Se la procento de trafoj restas sama, estas apenaŭ verŝajne, ke li nur divenis anstataŭ telepatie ricevis la ciferojn; la ŝancon de nura divenado oni devus esprimi per astronomie granda nombro.

La skizita procedo havas kelkajn avantaĝojn. Pro tio, ke la ricevanto devas elekti el limigita nombro da ciferoj ni povas kalkuli la ŝancojn de hazardaj trafoj kaj tiel scii, kiom nia rezulto superas la hazardon. La ĵetata kubeto preskribas la ciferojn. Libera elektado povas esti neutila ĉar eble vi ofte nekonscie elektas unu saman ciferon pro ia prefero al ĝi. Se tre hazarde ankaŭ la ricevanto havas preferon por la sama cifero, la kontento pro bona rezulto estas bazita sur senintenca sintrompo. Kubetoĵetado malebligas tion. Almenaŭ se ne la kubeto havas tian preferon, kiu hazarde koincidas kun la ciferoprefero de la ricevanto. Estas ja eble, ke la pezocentro de la kubeto ne estas en ĝia mezo. La sekvo estus, ke la kubeto multfoje indikus unu saman ciferon. Tiun eventualon oni povas eviti, uzante ekzemple post ĉiu deko da sekundoj alian kubeton.

Ni jam diris, ke la ricevanto ne povas vidi la kubeton. Preferinde li sidu en alia ĉambro kaj eventuale li ne sciu pri kubeto, sed nur, ke li elektu unu el ses ciferoj.

Kompreneble oni povas uzi aliajn objektojn anstataŭ ĵetkubeto por difini la sendendan koncepton, ekzemple ludkartojn. Richet aranĝis 2927 provojn per ludkartoj. La ŝanco de hazarde ĝustaj divenoj estis 732, sed la efektiva nombro da trafoj estis 789. Malgraŭ la malgranda diferenco la rezulto estas atentinda.

Tre grandaj eksperimentoj per ludkartoj okazis en Usono i.e. sub gvido de Prof. J. B. Rhine. La plej montrindan rezulton li atingis per gefianĉa paro, kiu faris 3400 karto-provojn (ŝi sendis, li ricevis). La ŝancnombro estis 680 sed la paro akiris eĉ 1496 sukcesojn.

Paul Christaller

Naŭdekunuĵara, forpasis je la ĵar-fino 1950 la plej distingita pioniro de nia movado en Germanujo, Paul Gottfried Christaller en Stuttgart. Naskiĝinte en Basel, Svislando, la 21-an de Aŭgusto 1860, Christaller fiksiĝis en Stuttgart, kie li estis profesoro en la Artmetia Lernejo. El misiista familio, li mem inklinis al tiu agado, lernis afrikajn lingvojn, sed definitive dediĉis sin al la desegnado kaj arto.

Lia por-Esperanta agado estas gravurita neforgeseble en nia historio. Lerninte la lingvon en 1904 li jam fondis en 1905 la tiean grupon, kiu seninterrompe ekzistis ĝis la fatala jaro 1933. Ano de la Lingva Komitato de la komenco, kaj de la Akademio, tio kun aliaj oficoj en la movado ligis lian nomon al multaj klopodoj plej diversaj. Lia nomo tamen fariĝis plej konata pro la modela vortaro por

germanoj, la “Christallervortaro”, kies reaperon li prilaboris ĝis lia vivfino. Inter liaj multaj laboraĵoj, tradukoj kaj originaloj ni citu nur la faman traktaĵon de Kant *Al eterna paco*. Profesoro Christaller aktive partoprenis en la Bahai-movado kaj estis profundsenta pacamiko.

Nomo estas aŭguro Christaller estis apostolo *Paŭlo* de nia movado en Germanujo kaj “Gottfried” ilustras lin bone, “Dia paco”. Tiel ni konis lin, junuloj, kaj aŭdis lin 45-jarulon pledi por nia ideo. Terure lin frapis la transformo de Germanujo per la nazi-revolucio. Lia alta aĝo lin protektis antaŭ policaĵ rimedoj de la reĝimo tiom malbonfame konata. En li malaperis la lasta eminenta pioniro de Esperanto en Germanujo aliĝinta al la afero inter 1900–1905. Li ripozu en paco.

H.J.

Eksperimenta Telepatio :

En 1920 Nederlanda Prof. G. Heymans gvidis telepatian eksperimenton dum kiu la ricevanto devis indiki kampetojn de tabulo kun 48 kampetoj. La indikendajn kampojn, kiuj estis elektataj per lotado, oni telepatie komisiis al li. La sendanto staris en supra ĉambro en kies planko oni muntis fenestron, tra kiu li povis vidi la tabulon kaj la manon de la ricevanto. Ĉi-lasto do lasis sian manon telepatie gvidi de la sendanto kaj tuj kiam li ekhavis impreson, ke li atingis la ĝustan lokon, li montre tuŝis kampeton. El 187 provoj lia nombro da ĝustaj tuŝoj estis 60, kio estas bonega rezulto kompare al la ŝancnombro.

Okazis ankaŭ karteksperimentoj,

dum kiuj sendantoj ne funkciis. La ricevantoj klopodis rekte diveni la bildojn, kiujn neniu rigardis aŭ sciis. Ankaŭ ĉe tiaj provoj la nombroj da ĝustaj diroj estis pli grandaj ol la ŝancnombroj. Tio do signifas, ke tiuj homoj kelkafoje sukcesis senpere, ekstersentume, ekscii nevideblon bildon. Dum tia provado okazis eĉ, ke personoj ekscii ne la koncernan bildon, sed la sekvontan; denove estis la ŝanckalkulo, kiu certigis tion. Tiel la eksperimenta telepatio liveris konfirmon pri la ekzisto de ekstersentuma perceptado kaj antaŭsciado. Sed per ĉi tiu rimarkigo pri tiuj du fenomenoj ni devias de nia temo, la pura telepatio. Ambaŭ fenomenoj apartenas al aliaj, kvankam apudaj, kampoj de la metapsikio.

36-a Universala Kongreso de Esperanto

München, 4-11 aŭg., 1951

Statistiko ĝis 31 jan. 51 : Argentino 1, Aŭstrujo 19, Belgujo 20, Brazilo 4, Britujo 120, Ĉeĥoslovakujo 4, Danlando 13, Egiptujo 4, Finnlando 9, Francujo 118, Germanujo 407, Hispanujo 1, Irlando 3, Islando 1, Italujo 35, Jugoslavujo 7, Maroko 1, Nederlando 23, Norvegujo 8, Polujo 5, Portugalujo 1, Sarlando 10, Svedlando 45, Svislando 15, Trieste 3, Sudafriko 1, Usono 8. Sumo 886 en 27 landoj.

Aldonoj pri hoteloj, loĝejoj : La hotelaj prezoj en la Oficiala Bulteno n-ro 2 kaj sur la mendiloj estas luksaj kaj bonkvalitaj, sed ekzistas ankaŭ kelkaj pli modestaj hoteloj, sed tamen uzeblaj. Ili estas malpli multekostaj. Bonvolu aldoni al la prezoj :

A Hoteloj post Kategorio 4 :

Kategorio K (komforta) GM 9.00

Kategorio M (modesta) GM 8.00

Geedzoj, infanoj aŭ junuloj, kiuj loĝos en unu ĉambro kun 2, 3 aŭ 4 litoj devas pagi la indikitan prezon por ĉiu persono, sed ili ricevos laŭ eblo iom da rabato. Tiun rabaton

ili ricevos ĉe sia hotelo post la alveno al München, montrante la eventualan repagslipon de la loĝeja oficejo. Tiun repagslipon sendos la loĝeja oficejo kun la loĝeja bileto. Oni devas speciale noti, ke oni deziras loĝi en ĉambro kun pluraj litoj.

3-a Oficiala Bulteno : Pro eventualaj ŝanĝoj en la kongresa programo kaj aranĝoj decidotaj de la U.E.A.-Estraro dum Pasko, aperos la 3-a Oficiala Bulteno nur dum aprilo sed ne dum marto, kiel anoncita en la 2-a Bulteno.

23-a. Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj

Tiu kongreso okazos 4-11 de aŭg. 1951 en München samtempe kiel la 36-a U.K. La programo estos aranĝata laŭeble tiel, ke oni povos partopreni la ĉefajn aranĝojn de la U.K. Ĉiujn informojn ĉe : Pastro Ludwig Thalmaier, (13b) Bad Kohlgrub, Germanujo. Anoncu vin baldaŭ ! Negermanoj pagu al la landaj perantoj de *Espero Katolika*.

INFANOJ KAJ PATRINOJ

de Dorothy Canfield Fisher (trad. T. J. Gueritte)

Racia, nescienca, rigardo al patrineco,
interesa al patr(in)oj de infanoj ĉiuagaj.

175 paĝoj—tole bindita—5ŝil., aŭfranko 6p.

Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Mendu ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth (Herts.)



Vivo Virina

Gvidantino de ĉi tiu rubriko estas :

S-ino R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road, SHERINGHAM, Norfolk, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiujn korespondaĵojn pri *Vivo Virina*.

Kiu volas respondon, nepre sendu rpk. (Britoj pm.) por afranko.

Filipinaj virinoj emancipiĝas :
Dum jarcentoj la tradicio malpermesis al filipinaj virinoj ian ajn parton en la publika vivo. Antaŭ la edziniĝo ili havis malmultajn okazojn akiri kulturon, kaj la sola profesio alirebla por ili estis la instruado. Post la edziniĝo la tradicio postulis, ke ili ne plu klopodu pri sinbeligo. Estis malpermesite forveturi for de la hejmo. Tamen post 1900 ĉio ŝanĝiĝis. Virina studento de juro, Concepcion Felix, organizis *Virina Asocio de la Filipinoj*, kiu batalis por la emancipiĝo kaj la rajtoj de la virinoj. Nun virinoj laboras kiel flegistinoj, kuracistoj, juristoj, dentistoj, arkitektoj k.s. Post la edziniĝo ili konservas sian belon. Ili vojaĝas eĉ ĝis Eŭropo. Edzineco kaj patrineco nun havas por ili pli profundan signifon.

Prizorgo pri la haroj : La Angloj havas proverbon : *La ĉefa gloro de virino estas ŝiaj haroj*. Kiel certigi, ke la haroj meritu ĉi tiun nomon ?

1. Ĉiutage brosu la harojn, uzante bonan broson kun longaj flekseblaj spikoj. Lavu ĝin almenaŭ ĉiusemajne. Ĉiam brosu supren. Uzu kombilon kun glataj, ebenaj dentoj.

2. Masaĝu la skalpon ĉiutage por certigi, ke la sango libere fluas al la harradikoj kaj por trankviligi la nervojn. En iuj landoj okcidentaj oni vaste uzas frotfluidon, delikate

parfumitan alkoholpreparaĵon, kiu tre agrabligas la masaĝon de la haroj*.

3. Zorge elektu la lavilon uzotan ĉar necesas atenti, ke oni ne sekigas la naturan oleecon de la haroj. Por sekemaj haroj olivoleaj laviloj estas plej bonaj, kaj por la jam oleecaj, kokosoleaj laviloj utilas. Ĉiam tute sensapigu la harojn.

4. Ne ĉagreniĝu pro forfalado de haroj—tio estas natura. Se tamen la haroj tro elfalas atento al diversaj faktoroj povas helpi : pli da dormo, pli nutra dieto, nervmedikamento, vitaminpiloloj. Provu stimuli novan kreskon de haroj per broso kaj masaĝado.

La recepto de la monato :
Florbrasik-fromaĝo :

Ingrediencoj : 2 florbrasikoj ; iom da pipro, papriko kaj salo ; raspita fromaĝo ; butero, akvo, lakto kaj faruno ; citrona suko.

Metodo : Kuiru la florbrasikojn ĝis moliĝo, kaj drenu ilin. Metu ilin en kuirpelson kun la kapoj supren. Faru saŭcon el la butero, akvo, lakto kaj faruno. Spicu ĝin kaj enmetu duonon de la raspita fromaĝo. Verŝu la saŭcon sur la florbrasikojn kaj disŝutu la reston de la fromaĝo. Kuiru en bakforno dum 10 minutoj. Servu varmega.

* Fabrikmarkojn mi ne rajtas doni. Mi povas informi private kontraŭ rpk.

W. Henthorne :

Spertoj de Interlingisto

(Ni opinias ĉi tiun neordinara dokumento. La lingvoproblemo estas multflanke traktita de lingvistoj, sed jen ni havas la starpunkton de ordinara homo nespecialista, kiu fariĝis adepto de *Occidental* (poste nomata *Interlingue*). Ni malofte ricevas tiel konkretan kaj senĉirkaŭfrazan opinion pri la meritoj de Esperanto kaj aliaj projektoj de internacia lingvo. Ni bonvenigas nian samideanon en niajn vicojn kaj gratulas lin pro lia kuraĝo publike proklami *por nia profito* sian erarön. Red.).

JAM en 1919 mi unuafoje eksciis pri la ekzisto de Esperanto. Tuj interesigante mi akiris lernolibron kaj vortaron kaj post nur dumonata studado mi jam sciis sufiĉe por povi korespondi en la lingvo. Mi komencis interŝanĝi leterojn kun samideanoj, aliĝis al la loka grupo kaj dediĉis min entuziasme al varbado kaj eĉ al instruado ĝis 1933.

Dum tiu periodo de agado diversaj cirkonstancoj ekestiĝis, kiuj minacis malardigi mian entuziasmon. Kvankam nia grupo ricevis ĉiuvintre novajn interesigantojn, ili tamen forlasis la aferon unu post alia, ĉu pro tedigo, ĉu pro malespero pri plena akiro de la lingvo.

La malfeliĉaj vivkondiĉoj inter 1920 kaj 1939 tute malebligis al mi partopreni internaciajn kongresojn aŭ eĉ naciajn; sekve mi neniam havis okazon senpere kontakti kun la Esperantistaro, kio estus por mi forta stimulo.

Mi mencias tiujn aferojn por ke estu klara la sekvanta faro mia. En 1928 senpete kaj neatende mi ricevis kelkajn foliojn pri *Occidental* (hodiaŭ nomata *Interlingue*). Mi denove eksentis allogon, intereson kaj esperon. Je la unua rigardo la lingvo aspektis pli facile lernebla ol Esperanto. Al ĝi mankis akuzativa

fleksio, adjektiva pluralo, kaj la sola supersigno estis la akcenta. Sur papero tio ŝajnis frapanta plibonigo kontraste al la gramatiko de Esperanto.

Mi studis la lingvon. Mi fariĝis adepto de la nova ideo. Dum 21 jaroj mi partoprenis la agadon por tiu lingvo kaj bone konas la movadon de interne. Kun la tempo mi tamen konstatis, ke tio, kio aspektas simpla teorie, ofte montriĝas malsimpla en la praktiko. Por fari *Interlingue* naturaspekta, bela por la rigardo, kaj alloga, oni oferis ĉion simplan kaj laŭregulan pro sklava imito de la naciaj (latinidaj) lingvoj.

La *Interlingistoj* ofte mallaŭdas Esperanton pro ĝia *nenatura* gramatiko, precipe pro la refleksivo kaj la akuzativo. Tamen laŭ propra sperto mi konstatis, ke ne la gramatiko estas la malfacila parto de lingvo, sed ĝuste la vortaro kaj la propra esprimmaniero de la uzantoj. Eĉ ĉe Esperanto oni sin turnas pli ofte al la vortaro ol al la gramatiko, sed certe ne tiom, kiom ĉe *Interlingue*, ĉar en tiu lingvo svarmas vortoj nekompreneblaj krom por homoj kiuj jam konas latinidajn lingvojn. D-ro Zamenhof mem konsciis tion kaj diris, ke kiam li finis sian gramatikon li ankoraŭ estis timigita de la grandegaj

vortaroj nacilingvaj. Li tial serĉis rimedon solvi tiun problemon kaj malgrandigi la vortaron, nelimigante la esprimpovon.

Laŭ mi estas pli facile lerni kaj praktiki la Esperantan si, ol la dubesencan *su* de *Interlingue*. La frazo *Il ruptet su cap contre li mur* estas interpretebla trimaniere: *li rompis sian kapon ; la kapon de alia viro ; aŭ la kapon de virino aŭ besto*. Tial en *Interlingue* oni devas aldoni frazeton. Post *su cap* oni diras *de il, de ella aŭ de it*.

En la limoj de ĉi tiu artikolo ne eblas detale pritrakti la mankojn de *Interlingue* kaj mi povas nur aludi pri la kaosa stato de la akcentado kaj de la manko de reguleco pri la enkonduko de novaj vortoj. La fanatika deziro al natureco rezultas je enkonduko de miloj da vortoj, kies signifo estas klara nur al la homoj el kies lingvo oni prenis ilin. Dum mia vivo kiel *Interlingisto* mi tenis ĉe mi la jenajn vortarojn: franc-anglan, hispan-anglan, ital-anglan, latin-anglan, kaj german-angla-angla-germanan. KREDU al mi, ke la konstanta kaj tedega konsultado de tiuj vortaroj tute elĉerpis min kaj mi fine tute tediĝis je *Interlingue*.

La aŭtoro de *Occidental*, E. von Wahl, siatempe defendis la artikolon *li* prefere al *le*. De tiam sporade okazis disputoj pri tiuj du artikoloj. Ŝajnas, ke oni nun preferas *le*. Malkonsento ankoraŭ ekzistas pri la afiksoj *de, des, di*, kaj *dis*, kaj ĉiu havas sian skolon.

Rilate al la valoro de *Interlingue* kiel konkuranto de Esperanto, mi povas diri, ke en Britujo estas nenio timinda. La nombron de adeptoj oni povas kalkuli sur la fingroj de unu

homo. Ankaŭ tio estis kaŭzo de elreviĝo, ĉar mankis kontaktoj. En la malvasta internacia korespondado mi devis ĉiam parkere pligrandigi mian provizon de vortoj ĉar mankis en la lingvo la genia, vaste evoluinta sistemo de vortkonstruo kiu estas tiel unika kaj valora trajto de Esperanto.

La literaturo ĝis nun konsistas ĉefe el **mimeografaj broŝuroj traktantaj polemikajn aferojn** ! Malgraŭ tio, ke oni propagandas la lingvon jam 28 jarojn oni ankoraŭ **ne sukcesis aranĝi internacian kongreson aŭ konferencon** !


Laŭ mia opinio, nekontraŭstarebla pruvo pri la meritoj de Esperanto estas la fakto, ke kvankam mi revenis al Esperanto antaŭ nur unu jaro, koincide kun la fino de 21-jara kontakto kun *Interlingue*, mi povis esprimi min pli facile en Esperanto ol en tiu alia lingvo. Mi konstatis je mia reveno, ke mi forgesis neniom de la gramatiko, kaj necesis nur, ke mi iom refreŝigu min je la neordinaraj vortoj.



Internacia Ferio-Semajno

En Konstanz (suda Germanujo) estas preparata Internacia Ferio-Semajno kun perfektiga kurso, okazonta dum la semajno tuj antaŭ la 36-a U.K. en München, t.e. 28 jul.-4 aŭg. 1951.

La brila sukceso de la kunveno de TJO igas superflua rekomendon pri Konstanz, kiel ideala feriloko kaj la lokaj organizantoj direktas varman inviton al la gesamideanoj partopreni. Adreso: Internacia Ferio-Semajno, Esperanto, Konstanz, Grüngang 2, Germanujo.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

***Misteroj de l'Vivo** de Agnes Bøgh-Høgsted ; noveloj tradukitaj el la Dana lingvo de C. Graversen. Eld. Dansk Esperanto-Forlag. 22×15cm., 100 p. broŝ. prezo 4ŝil. 9p. afranko 4p.

Antaŭ kvin jaroj, sub la nomoj de la samaj aŭtorino kaj tradukinto, aperis novelkolekto kun la titolo *Pli ol fantazio*, kiu tiutempe ricevis laŭdojn de la recenzantoj ne nur pro la enhavo sed ankaŭ pro la lingvaĵo. Feliĉe, pro similaj motivoj mi povas laŭdi ĉi tiun novan kolekton de kvin noveloj. Denove la aŭtorino pentras bildojn pri la vivo de ordinaraj homoj laŭ tonoj tiel kvietaj kaj ĉarmaj, ke mi povas facile pardoni al ŝi, se la koloroj estas iaforte de nuancoj, kiuj impresas min sentimentalaj. Religia tendenco enestas en kvar el la noveloj, sed ili neniel predikas kaj mi trovis tre plaĉaj la portretojn de Jakobo Roland, la vilaĝa forĝisto, kiu sekrete verkas novelojn kaj post malespero ĝis preskaŭ sinmortigo fine per ili gajnis monon ; de So-Sofie, dikulino, kaj ŝia fidela amanto, al kiu ŝi savas la vivon mem dronante ; de Jesper Hald, kiu dumnokte en la lunlumo meditas pri sia pasinta vivo ; kaj de la honesta sed ne brila pastro Johano Torp, kiu je Pentekosto ricevas novan spiriton.

La finan novelon *Lasse* mi trovis malpli kontentiga. Ĝi temas pri la forta simpatio ekzistanta inter patrino kaj filo. Por akcenti tiun ligadon la verkistino enkondukas knabon, Valdemar, kies patrino lin miskomprenas. Mi konfesas, ke mi sentis

pli da scivolemo pri la sorto de tiu subrolulo, ol pri Lasse, sed ĉe ties morto li tute malaperas el la historio. Poste dum la milito bombo de Germana aviadilo mortigas la patrinon de Lasse. Al mi tiu enkonduko de "realismo" tute ne taŭgas al la arto de la aŭtorino, kiu kutime pentras siajn figurojn sur senkontura fono.

La lingvo, kontrolita de la Literatura Komitato de F.L.E., estas de alta nivelo. Tamen la tradukinto ŝajne timante, ke la vorto *krom* kondukus al miskompreno (pri tio li turnu sin al P.V.) anstataŭe uzas *escepte*, kun rezulto ofte logike defendebla. Anstataŭ doni novan signifon al *svatis* (p. 27) mi preferus *amindumis*. Interesaj esprimoj estas *liaj kubutoj ne estas sufiĉe pintaj* kaj (pri vekhorloĝo) *ĝuste akomodita*.

C. D. A. Capp

***Inter sudo kaj nordo** : orig. verk. de Ferenc Szilágyi. Eld. Eldona Societo Esperanto, Stockholm. 19×13cm. bind. 185 p. prezo 12ŝ. 6p., afr. 6p.

Ĉi tiun novan aldonon al nia internacia literaturo oni povas bonvenigi jam je la unua ekvido pro la agrabla ekstero de la svelta volumo kun unuaranga presteknika aranĝo kaj bona papero—konstantaĵoj ĉe la svedaj eldonoj. Cetere temas pri originala verko kaj tio, precipe de la plumo de F. Szilágyi, estas okazo salutinda.

Estas iom nefacile klasigi ĉi tiun verkon (aŭ verkaron). Kelkaj el la

pecoj havas la formon de novelo—unu, *La turka marŝo*, efektive estas romaneto—sed aliaj, *La enirejo de la tunelo* (fragmento en kiu la aŭtoro ekspluatas renkonton kun ebriulo por konklude filozofii pri *nia afero*), *Viola* (rakonto pri korespondado kun ftiza knabino savita el koncentrejo) kaj *Inter sudo kaj nordo* (traktanta epizodojn dum deĵoro kiel tradukisto por hungaraj labortrupoj en Svedlando) estas rakontoj kies materialo estas ĉerpita el la riĉaj travivaĵoj de la aŭtoro en diversaj medioj. *Aventuro en kvar etapoj* (iom nebula miksaĵo de unuaj impresoj pri svedaj komunumo kaj arbaro kun sonĝado pri urso), *Lordo* (rakonto pri hundo) kaj *Sinamo* (delikata traktado pri observoj kaj mistifikiĝo de infano antaŭ la delikto de patro kaj onklino) kompletigas la tuton.

La senpretendaj temoj donas al la aŭtoro okazojn kaj cirkonstancojn elmontri penetran observemon pri detaloj de homa konduto en la plej diversaj situacioj. Aparte elstara allogo de la verko de F. Szilágyi ŝajne fontas en tio, ke oni ofte sentas la deziron halti dum la legado kaj diri: “Jes, ĝuste tiel agas S-ro A.” aŭ “Tiel parolas S-ino B.”, konatoj niaj. Li posedas neordinaran talenton kvazaŭfote kapti kaj registri impresojn pri la homaj emocioj kaj homaj karakterizoj. Ĝuste pro tiu fidela prezento de ordinara homaj kvalitoj, la neserioza leganto facile povas preteratenti la lertan komponon de la bildoj en kiuj reliefas realaj homoj, realaj scenoj.

Ilin legante mi iafoje havis la impreson, ke la pecoj apartenas plie al la eseo, ol al la fiktiva literaturo. Mi sentis plurfoje, ke mi legas skribaĵon de konata rubrikisto en ŝatata periodaĵo, kaj konsciis la

varman ĉirkaŭprenon de intima babilo, de komentaro pri la okazoj de la ĉiutago. Kun unu escepto *Viola*.

Finleginte tiun rakonton pri korespondado inter la aŭtoro kaj hungara junulino, kiu, post teruraj implikiĝoj en la faŝista teroro sekve de sia juda origino, fine trafis en sanatorion svedan, mi ne hezitis esprimi la opinion, ke F. Szilágyi per tiu peco atingis la plej altan nivelon de sia ĝisnuna artista kariero. La delikata pritrakto pri la evoluo de okazoj, la diskreta kaj psikologie ĝusta prezento de la animaj kaj emociaj vasciloj inter hela optimo kaj nigra pesimo flanke de la ftiza Viola, la preskaŭ genia elekto de vorto kaj frazo, pravas kiom elvolviĝis la talento de la aŭtoro de la tempo, kiam li verkis la iom pretendeman *Trans la fabeloceano*.

La jena verkaro konfirmas konjekton, kiu okupis min je tralego de lia antaŭa verko, novelkolekto, *La granda aventuro*. Estus interese analizi, kiom la nuna ekfloro de la talento de F. Szilágyi ŝuldiĝas al lia transloĝo al Svedlando kaj al senpera kontakto kun la tute aliaj tradicio kaj kulturo de la nordo. En liaj fruaj verkoj oni povis rimarki la tro-ornamon, la uzadon de ekzotikaj “koloroj”, kaj lia “simbolismo”—kiel tro ofte ĉe multaj “modaj” aŭtoroj—iafoje suspektigis pri nebula pensado. Evidentis en liaj fruaj verkoj strebo al efekto kaj al la deziro imponi. Tamen en *La granda aventuro* ni jam konscias pli sobran, ne tiom efemeran, pli “solidan” kvaliton en la karaktero de lia arto. Montriĝas ia sinbrido, disciplino. Kaj en la nova verko *Inter sudo kaj nordo* ni vidas kvazaŭ plenan grefton de la sudlanda merkura

temperamento sur la klarvidan racion, la dignon kaj la noblon de la nordlando. Mi dirus, ke F. Szilágyi nun staras kun la piedoj sur firma tero. Mi atendas multon de li kaj mi volus sugesti, ke sur la larĝa tolo de romano lia nove akirita talento trovas lokon por plena maturiĝo. Nur en la kadro de granda verko ni povas mezuri la veran staturon de krea artisto.

M.S.

Socialisma libereco aŭ kapitalisma servuteco? Paco kaj prospero aŭ milito kaj mizero? : Daniel de Leon. Deklaro de la Usona Socialista Laborista Partio, 1950; 32 paĝoj, 18×13cm. prezo 0.17 dol. Disvendata de S.A.T.

En la granda (ĉu fina?) batalo inter la kapitalisma realeco kaj la socialisma idealo, ja utilas informiĝi pri origino, bono kaj malbono de reganta sistemo ekonomia kaj la propagando por pli bona estonteco, kaj ja ne ŝpareme oni uzis vortojn tiucele. La jena broŝuro estas esence propaganda laŭ la maniero "nigra kontraŭ blanka". Ĉu kapitalismo sola kaŭzas militon, pri tio oni rajtas tamen dubi, ĉar ekzistas aliaj faktoroj kiuj puŝas popolojn kontraŭ popoloj, homojn kontraŭ homoj. La nuna broŝuro tamen enhavas aron da veroj, neniam sufiĉe ripetataj por ke ili iĝu komuna propraĵo. La teksto legiĝas flue, forestas novaj kreaĵoj de vortoj ofte troveblaj en tiaj traktatoj politikaj.

H.J.

Wir lernen Esperanto, die Welthilfssprache (Ni lernas Esperanton, la mondhelplingvo) : W. kaj H. Wingen. Eld. Verlag der Limburger Vereinsdruckerei, G.m.b.H., Limburger/Lahn. 21×15cm., 80 p. broŝ., prezo nemontrita.

Ni jam ŝuldas multon al tiu presejo pro ĝia eldono de la bona gazeto *Esperanto-Post*. Ĉi tiu lernolibro atingas la altan nivelon, kiun ni atendas de ĉi tiu firmo. La plano estas bona—unue vortaro Esperanta-germana, due artikolo pri Esperanto, trie praktikaj sugestoj pri la metodo uzi la libron. En ĉiu leciono troviĝas gramatika regulo, rimarkoj pri prononco, ekzerco kaj legaĵo. La instruo estas plena kaj ne tro rapida. Se oni konsciencie tralaboras ĉi tiun libron oni havos bonan, kvankam elementan scion de la lingvo. Bedaŭrinde la libro taŭgas nur por tiuj, kiuj scipovas la germanan lingvon ĉar ĉiuj klarigoj estas en tiu lingvo.

R.M.D.

Ricevitaj :

Propono de Esperanto-stenografio de A. Stanura, Táhorska 42, Ostrava-Radvanice, Ĉeĥoslovakujo.

Nancy : turisma broŝuro eldonita de : Syndicat d'Initiatives 57 rue Saint-Jean, Nancy, Francujo.

Tutmonda Popola Delegitaro : faldfolio de samnoma organizaĵo ĉe : 54, Baker St., London, W.1, Anglujo.

Konstitucio de la Popola Respubliko Bulgario. Eld. Bulgara Esperantista Kooperativo, Sofia, Bulgarujo.

Katolika Katekismo, Preĝareto de Katolikaj Esperantistoj, Esperanta Katoliko : eldonaĵoj de Katolika Asocio de Japanaj Esperantistoj ĉe Anselmus Matubara-Hatirō, Nanmatsu-tyō 24, Kisiwada, Japanujo.

Aflenz : prospekto havebla kontraŭ unu rpk. ĉe : Esperanto-servo, S-ro P. Angerer, Aflenz-Kurort, Stirio, Aŭstrujo.

Digha Nikajo : Prezento de Kanona Skribaĵo de Budhismo en Esperanto; 50-paĝa broŝ. ĉe G. H. Yoxon, 16 Grange Drive, Heswall, Cheshire, Anglujo.

La Interligilo : Centra Organo de Fakinformoj en Esperanto. Organo de ILEPTT. Speciala eldono, katalogo de oficialaj poŝtaĵoj kun Esperanta teksto. Administracio : 46 rue Lamartine Paris 9, Francujo.

Niaj kunlaborantoj

Delfi Dalmau, Peranto en Hispanujo

TIAL ke en 1950 la internacian konkurson gajnis Hispanujo, konvenas, ke ni komencu la jenan rubrikon per biografieto pri la Peranto de U.E.A. en tiu lando, S-ro Delfi Dalmau.

S-ro Dalmau Esperantistiĝis en 1909 en Barcelona sub gvido de konataj pioniroj de la tiama societo *Esperanto Kataluna*. Li mem baldaŭ instruis la lingvon precipe per la rekta metodo, principe de Berlitz lingvolernigado. Li partoprenis per paroladoj kaj verkado en ĉiuj gravaj entreprenoj de la Esperanta movado en Katalunujo, kaj estris rubrikon en Barcelona ĵurnalo *La Publicidad*. Partoprenis U.K. en Antverpeno (1911), Bern (1913), Parizo (1932), Londono (1938). Konkursis kaj atingis premiojn en Internaciaj Floraj Ludoj. Transloĝiĝis al Bahía Blanca (Argentino) kaj tie loĝis de 1913 ĝis 1917. Li tie iniciatis movadon per instruado de Esperanto. Li atingis profesorecon (doktorecon) por oficialaj mezaj lernejoj (komerca kaj instruista) en Bahía Blanca. Li revenis al Barcelona en 1918. Li estris en Kataluna Esperantista Federacio, en la gazeto *Kataluna Esperantisto* kaj en la Internaciaj Floraj Ludoj. Li kunlaboris por *Kataluna Antologio*.

S-ro Dalmau edziĝis en 1926 kaj ĉiuj kunhejmanoj, la edzino, unu filo kaj unu filino, estas Esperantistoj. Li estas D. de U.E.A. en Barcelona, kaj publikigis lernolibrojn kaj literaturajn verkojn en kataluna lingvo. Kunlaboras pri internacia stenografio en fakaj gazetoj en kelkaj



landoj. Membro de la Akademio de Esperanto. Peranto de U.E.A. de 1949.

GAZETOJ

aboneblaj ĉe U.E.A.

	<i>Jarabono</i>
Amerika Esperantisto ..	10ŝ.
The British Esperantist ..	5ŝ.
Esperantisto Slovaka ..	8ŝ.
Franca Esperantisto ..	9ŝ.
Heroldo de Esperanto ..	17ŝ. 6p.
La Interligilo (P.T.T.) ..	7ŝ. 3p.
Internacia Kulturo	
	ŝajne ne plu aperas
La Ponto (Germanujo) ..	5ŝ.
La Praktiko ..	12ŝ.
La Suda Stelo	
(Jugoslavujo)	7ŝ.
Malgranda Revuo	
(literatura)	8ŝ. 6p.
Norvega Esperantisto ..	5ŝ.
Scienca Revuo ..	10ŝ.
Sveda Esperanta Gazeto	8ŝ. 4p.
Svisa Espero ..	10ŝ.
Voĉo de Islando — ne aperos en 1951	

Enigma Konkurso N-ro 56

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo

Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 54.

N-ro 118 : Fremda doloro ne kondukas al ploro. Frago, patro, ŝelko, gramo, kardo, rango, bardo, tiaro, peltó (el petro), omaro, marto, leono, azeno, mieno, drako, dorno, lando, lardo, ulano, lakto, marko, skema, lamao, lutro, kapro, larmo, ardeo, merlo, tilio.

N-ro 119 : Sidi kiel sur pingloj. Atmosfero, marcipano, akcidento, predikato, anarkisto, sindikato, profesoro, akvilegio, balistiko, postulato, obstrukco, aeroplano, specimeno, seminario, telegramo, ambulanco, mandolino, kanajlaro.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 52-a konkurso : S-ro A. v. d. Velde (Belg.) 151 p., S-ro H. Westergaard (Dan.) 149 p., F-ino J. Dedieu (Franc.) 148 p.

Enigmo N-ro 122 : La sekvantaj kvin personoj loĝas en la sama danĝera loko : Grafo Skilisto, Petro Ostido, Petro Terenzan, Grafo Stienito, Mario Songito. Kiuj estas iliaj profesioj kaj kie ili loĝas, se la literojn de ĉies nomo vi povas aranĝi tiel, ke ili nomas la profesion de la koncerna persono, kaj la komenc-literoj de la profesioj formas la lokon, kie ili loĝas.

Enigmo N-ro 123 : Faru kiel eble plej multe da oficialaj nederivitaĵoj, sepliteraj aŭ pli grandaj VERBOJ el la literoj de la vorto KAMENPURIG-ISTO kaj bonvolu alfabeto ordigi ilin. (La vortoj do devas finiĝi per la litero "i", kaj vortoj kiel "agnoski"—neoficiala, "kongresi"—derivita el "kongreso" "turmenti"—du literoj "t", ne estos akceptataj).

Enigmo N-ro 124 :

A D O A D I L P O	C I A, D E G R A	E K Z P R E O L O	I U L A N U T	I S T N I Ĝ J, A	L A K O M P O P
N G V S I L L	N T E H O O M A	O I L A A H	R K U J G A N	R N A M O J R O	P O V D O J I L O
P E Ĉ I N D E	L I T E R S A	D E I N R T U	U S K A J N.		

Metu la ĉi-suprajn litergrupojn tiel unu flanke de la alia, ke vi povas legi trilinean elparolon de D-ro Zamenhof. Kie troviĝas tiu elparolo ?

La Bremenaj Urbmuzikantoj

IAM estis viro, kiu havis azenon. Tiu azeno ĉiam estis portinta la sakojn al la muelejo. Kiam li maljuniĝis kaj ne plu povis laboregi, lia sinjoro volis mortigi lin. Rimarkinte tion, la azeno forkuris.



Li deziris iri al Bremeno, kie li volis fariĝi urbmuzikanto. Li ne estis irinta malproksimen, kiam li rekontis hundon, kies lango pendis el la buŝo pro manko de spiro. “Kial vi anhelas tiel?” demandis la azeno. “Ho ve,” respondis la hundo, “mi fariĝis maljuna kaj malforta kaj ne plu povas ĉasi. Ĉar mia sinjoro volis mortigi min, mi forkuris.” “Do,” diris la azeno, “venu kun mi! Mi

iros Bremenson por fariĝi urbmuzikanto. Mi ludos la liuton kaj vi batos la tamburon.” La hundo konsentis kaj ili ekiris. Post ne tre longa marŝado ili renkontis katinon sidantan ĉe la vojo. Ŝi estis tute melankolia. “Kio malĝojigas vin?” demandis la azeno. “Mi maljuniĝis kaj miaj dentoj malakriĝis. Tial mi ne plu ŝatas ĉasi musojn, sed preferas sidi ĉe la fajro. Mia sinjorino volis dronigi min kaj mi forkuris,” respondis la katino. “Vi estas ĝuste la akompananto, kiun ni bezonas. Venu kun ni! Ni estas survoje al Bremeno por fariĝi tie urbmuzikantoj,” diris la azeno. Ankaŭ la katino konsentis kaj ili ekiris.

Dumire ili preterpasis farmbienon, kie ili vidis kokon sidantan sur la pordego kikerikantan treege laŭte. “Kio premas vin?” demandis la azeno. “Morgaŭ estos multaj gastoj en nia domo kaj tial mia sinjorino decidis kuiri bongustan ŝupon. Ŝi volas tranĉi mian gorgon kaj min uzi por la supo. Nun mi kikerikas laŭforte tiom longe kiom mi kapablas.” “Venu kun ni; ni iras al Bremeno por tie fariĝi urbmuzikantoj. Vi havas belegan voĉon kaj kiam ni muzikos vespere, ĉiuj ĝojos.” La koko konsentis pri la propono kaj ili iris plu.

Ili marŝis ĝis krepusko kaj ili komencis pensi pri loko, kie ili povos pasigi la nokton. Je tiu tempo ili venis al arbaro proksime de Bremeno. La azeno kaj la hundo kuŝiĝis sin sub granda arbo; la katino grimpis sur ĝin kaj la koko flugis sur la plej altan pinton por havi rondrigardon. Ne tro malproksime ŝajnis esti lumo. Li rakontis al siaj kunuloj, ke tie devas esti domo.

Ili iris tien kaj la azeno rigardis tra la fenestro. Ili miregis pri tio, kion ili vidis. Estis rabistoj en la ĉambro, kiuj diboĉis manĝegante kaj drinkante. “Tiu estus bona manĝaĵo por ni,” diris la koko. Tiam la bestoj pripensis, kiamaniere elpeli la rabistojn kaj fine ili trovis rimedon. La azeno metis siajn krurojn sur la fenestran breton, la hundo saltis sur la dorson de la azeno, la katino grimpis sur la dorson de la hundo kaj la koko sidigis sin sur la kapon de la katino. Post tio ili ekmuzikis. Je donita signo la azeno ekblekis, la hundo ekbojis, la katino ekmiaŭis kaj la koko ekkikerikis. Tiam ili sin ĵetis tra la fenestro tiel, ke la vitro brue rompiĝis. Pro la terura bruo la rabistoj estis tiel timigitaj, ke ili forkuris en la arbaron. Tiam la kvar bestoj sidiĝis kaj festenis. Poste ili estingis la lumon kaj ekdormis.

Ĉiukaŭ noktomezo la rabistoj vidis, ke la domo estas tute malhela kaj la bandestro resendis unu rabiston al la domo. Post nelonge li revenis en granda timo kaj rakontis al ili siajn travivaĵojn. “Mi kuris al la domo,” li diris, “kaj eniris. Kiam mi provis ekbruligi kandelon, terura sorĉistino gratis mian vizaĝon; malantaŭ la pordo estis viro, kiu pikis mian kruron per tranĉilo; en la korto estis monstro, kiu terenbatis min per bastonego; kaj sur la pinto de la domo estis la juĝisto kiu daŭre kriis: “Ĵetu lin al mi! Ĵetu lin al mi!” Do mi kuregis por savi mian vivon.”

La Bremenaj urbmuзикantoj estis tiel kontentaj pri sia nova hejmo, ke ili feliĉaj restis tie por ĉiam, kaj se ili ne mortis, ili ankoraŭ hodiaŭ vivas.

*laŭ malnova fablo verkis
Günter F. A. Milanowski.*

Internacia Konkurso 1951

La suba tabelo, kompilita je la fino de Januaro, montras ke la jaro komenciĝis pli bone ol iam antaŭe, parte pro la frua pago de multaj membroj kaj parte pro la bona enfluo de novaj membroj. Jam pli ol duono de la landoj atingis 50% de siaj kvotoj; kaj ni havas bonan esperon ke ĉiu lando kiu partoprenas en la konkurso atingos 100% antaŭ la fino de la jaro. Ĉiu membro devus helpi al sia lando atingi la celon. Apartan gratulon ni esprimas al la unuaj kvin landoj, kiuj faris vere brilan komencon.

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando ..	2000	1985	99.3
2.	Portugalujo ..	600	565	94.2
3.	Japanujo ..	800	685	86.4
4.	Sud-Afriko ..	250	205	82.0
5.	Danlando ..	2800	2295	81.9
6.	Svislando ..	1400	1030	73.6
7.	Izraelo ..	300	220	73.3
8.	Britujo ..	12000	7992	66.6
9.	Germanujo ..	2400	1565	65.2
10.	Norvegujo ..	1400	890	63.6
11.	Italujo ..	1700	1050	61.8
12.	Maroko ..	400	245	61.3
13.	Irlando ..	250	145	58.0
14.	Belgujo ..	2100	1209	56.1
15.	Hispanujo ..	1100	585	53.2
16.	Kanado ..	250	130	52.0
17.	Brazilo ..	2500	1112	44.5
18.	Svedlando ..	5300	2223	42.0
19.	Nov-Zelando	800	330	41.3
20.	Nederlando ..	5000	1920	38.4
21.	Francujo ..	5700	1972	34.6
22.	Aŭstralio ..	900	265	29.4
23.	Usono ..	3000	830	27.7
24.	Kubo ..	250	55	22.5
25.	{ Aŭstrujo ..	1000	40	4.0
	{ Islando ..	500	20	4.0

**Plifortigante U.E.A., vi servas
ankaŭ la interesojn de vi mem.
Varbu konstante !**



Por via distro

Sendu vian plej bonan anekdoton al M. Otiel,
Universala Esperanto-Asocio, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Malabundo en Anglujo

Kliento : Mia Dio ! Ĉu vi nomas tion kokidsupo ?
Kelnero : Nu, ĝi almenaŭ estas la akvo en kiu ni boligas la ovójn, sinjoro !

La moderna arto ? ?

Amiko : Via pentraĵo estas perfekta. Tamen estas io, kion mi inklinas kritiketi. Ŝajnas al mi, ke la originala ne estas tiom ruĝvizaĝa, kiom vi lin pentris.

Pentristo : Pro la diablo, pri kiu vi parolas ?

Amiko : Kompreneble pri via onklo.

Pentristo : Fulmotondro ! Tio ne estas mia onklo, sed la sunsubiro !

La recepto

Kampulo havis ĉevalon, kiu mal-sanis kolike. La bestkuracisto esploriginte donis pulvoron, kiun la kampulo metu en tubeton kaj blovu en naztruon de la ĉevalo. Kiam la sekvantan tagon la kuracisto faris sian viziton, li trovis la kampulon antaŭ granda kuvo da akvo, freŝiganta siajn okulojn, kiuj estis tre ruĝaj.

Kuracisto : Ha, bonan tagon. Kiel fartas via ĉevalo ? Ĉu vi blovis al ĝi la pulvoron ?

Kampulo : Mi ja provis, sed la fibesto blovis la unua !

(H. Korell).

Kio estas via V.-K. ?

(Respondoj sur p. 90)

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustan el la signifoj donitaj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselecto aŭ nescio.

1. **Aŭtokrato** : (a) memlerninto, (b) absoluta regnestro, (c) persono havanta fortan sinregon ?
2. **Impeti** : (a) urĝe petegi, (b) fervore aspiri al celo, (c) akiri ?
3. **Agariko** : (a) juvelo, (b) kormalsano, (c) manĝebla fungo ?
4. **Ŝovinisto** : (a) fanatika patrioto, (b) diktatoro, (c) ŝtatperfidulo ?
5. **Farĉo** : (a) komika teatraĵo, (b) intrigo, (c) hakita kaj spicita viando aŭ legomaĵo ?
6. **Aŭguro** : (a) longforma frukto, (b) matenruĝo, (c) antaŭsigno ?
7. **Graco** : (a) bele proporcia formo, (b) spirita helpo de Dio, (c) ŝercaĵo ?
8. **Konkordo** : (a) harmonio inter pluraj personoj, (b) vetbatalo, (c) interkonsento rezulte de reciprokaj ceditoj ?
9. **Siroko** : (a) kuirita solvaĵo de sukero, (b) varmega Mediteranea vento, (c) sveno ?
10. **Slojdo** : (a) glitveturilo, (b) manlaboro kun eduka celo, (c) dumasta velŝipo ?



ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj :

I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Dimanĉo	16.00–16.20	Roma. 19.5m., 31.1m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	05.30–05.35	Wien. 513m., 25m., 30m., 41m., 48m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	07.15–07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. P. Radiodiffusion Française, Lille (Nord), Francujo.
	14.30–15.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação e Saude, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. I. (ĉiun duan lundon). V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	01.15–01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 28, Bern.
	17.35–17.40	Bern. Kiel je 11.50, sed anst. 13.94m., sur 19.60m.
	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I.
	23.30–23.45	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América. Guatemala Cd., C. Ameriko.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 347m., 48.39m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
Vendredo	16.00–16.20	Roma. Kiel dimanĉe.
	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I.
Sabato	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Klarigo—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Stacio K.R.O., Hilversum, Ned., volas scii, ĉu aŭskultantoj pli bone ricevas laŭ ondolongo 298m. aŭ 402m. Ĝi elsendos laŭ 298m. ĝis aprilo ; de aprilo ĝis julio laŭ 402m. Nepre sciigu la instancojn !

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.



NIA FORUMO

PAROLAS LA LEGANTOJ

Lingvo hinda

Kompletige al la interesa artikolo de G. Agricola en la maja numero de *Esperanto* (p. 70) mi volus aldoni la jenajn notojn.

Hindi, Urdu, Hindustani: La gramatikoj de ĉiuj tri estas preskau identaj. La radikojn en *Hindi* oni emas preni el Sanskrito; en *Urdu* el la Persa lingvo, sed la ĉefa mal-simileco estas ĉe la skribmaniero. *Urdu* oni skribas per la tute netaŭgaj Perso-arabaj literoj, *Hindi* per la *Devanagri*—unu el la plej logikaj kaj kompletaj alfabetoj imageblaj. *Hindustani* estas malpreciza nomo, kiu ofte signifas pli-malpli “neŭtralan” lingvon pri radikenhavo, ofte nur *Urdu* skribatan per romanaj literoj. En tiu ĉi senco la Britoj igis ĝin “universala helplingvo” de la Hinduja armeo.

Gramatiko: ekzistas interesaj apartaĵoj inter kiuj oni trovas kelkajn kiuj rememorigas al la Esperanta gramatiko. Ekzemple, troviĝas ne-kompleta serio de korelativoj: *kab* (kiam?), *jab* (kiam, kun rilata senco), *tab* (tiam), *kahan* (kie?), *jahan* (kie—rilata), *wahan* (tie), *yahan* (tie ĉi) k.t.p.

Ankaŭ la *kaŭzativaj* verboj pensigas pri la Esperanta sufikso *ig*. Multaj verboj povas iom ŝanĝi siajn radikojn por esprimi *kaŭzi*, ekz.: *pio* (trinku), *pilao* (trinkigu), *ghori pilao* = trinkigu (vi) la ĉevalinon. Oni eĉ povas denove ŝanĝi la formon por egali *igigi*! Ekz. *ghori pilwao* = trinkigigu (per iu ajn, ne vi) la ĉevalinon. (Mi kredas, ke io simila ekzistas nur en la Hungara lingvo).

La preterito (kiel ankaŭ en la Rusa lingvo) estas adjektiva, t.e. ĝi akordas kun la nombro kaj sekso de sia subjekto, ne kun la persono kiel en, ekz., la Franca kaj Germana lingvoj: mi (virino) venis, *main ai*; ŝi venis, *wuh ai*; sed—mi (viro) venis, *main aya*; li venis, *wuh aya*.

Nacia lingvo: *Hindi*, skribita per la *Devanagri* literoj estas nominale la nacia lingvo de Hindujo, kaj *Urdu* de Pakistano; sed, almenaŭ en Hindujo, nur nominale, kiel ekz. la “nacia” lingvo en Irlando. Precipe en Hindujo ekzistas forta kontraŭ-*Hindi*-a staro. En Bengalo oni prave pretendas, ke ilia lingvo estas literaturriĉa, kaj fiere montras Nobel-premiiton, Tagore. En la Sikh-aj teritorioj oni estimas la *Gurmukhi*-lingvon kiel preskau sanktan, kaj antaŭ nelonge okcidenta universitato proponis iom post iom en siaj prelegoj anstataŭigi la anglan lingvon, ne per *Hindi*, sed per *Marat’hi*.

Tamen ĉefe en suda Hindujo estas fortega kontraŭ-*Hindi*-a opinio. Tie, t.e. en la Provinco Madras kaj la du ŝtatoj Travancore-kun-Cochin kaj Mysore oni parolas la t.n. *Dravidajn* lingvojn, tute malsimilajn al *Hindi* precipe pri la gramatiko. Hindiemuloj eĉ proponis, ke oni ne plu instru tiujn lingvojn en la lernejoj, ke ili fariĝu nur “vilaĝaj” lingvoj! Oni povas konstati, kiom forta estas la kontraŭstaro el la fakto, ke antaŭ nelonge la Eduk-Ministro de la Madrasa provinco ordonis, ke estu devigaj en lernejoj la patralingvo kaj la Angla, kaj ke *Hindi* estu nur nedeviga. Restas konstati, ĉu la centra registaro perfortos ŝanĝon de tiu ordono. Tamen la kultura “nacia” lingvo de Hindujo kaj precipe de suda Hindujo estas la Angla.

*Majoro R. Raven-Hart,
Bangalore.*

Etimologia Demando

GENERALE la etimologio de la Esperanta vortaro estas tute klara, almenaŭ koncerne konstatadon, el kiu nacia lingvo certa vorto estas plej proksime prenita. Tamen ekzistas vorto, kies etimologio estas malfacile klarigi, nome *brogi*.

La sola nacilingva vorto, kiu ŝajnas respondi al ĝi, estas la germana *brühen* (*brogi*). Sed kiel povas esti, ke la *h* de *brühen* fariĝis *g* en Esperanto? Ĉu arbitra ŝanĝo fare de Zamenhof? Aŭ ĉu eble ekzistas ia pravigebla motivo por tiu ŝanĝo?

Hazarde en *Früneuhochdeutsche Glossar* (Frunovaltgermana Glosaro, t.e. la germana lingvo proksimume de la fino de la 15-a ĝis la mezo de la 17-a jarcentoj) mi trovis la vortojn *brüger* = *Fleischergesell, der das geschlachtete Vieh abbrüht* (buĉista helpanto, kiu brogas la buĉitan bruton) kaj *brüg* = *Brühe* (brogaĵo, buljono).

Povas esti, ke ĉi tie efikis tiu fonetika leĝo, kiu diras ke sub certaj

akcentaj kondiĉoj *h* ŝanĝiĝas al *g*. T.e., origine senvoĉa *h* ŝanĝiĝis al voĉa *h*, poste senvoĉa *h* fariĝis *h*, kaj voĉa *h* fariĝis *g*. Ekzemplon pri tio ni vidas en *ziehen, gezogen* (tiri, tirita). Sed ĉu tio estas verŝajna, ke Zamenhof estis influita de tiu leĝo? Dubinde.

Alia klarigo estas tio, ke *h* en multaj internaciaj vortoj, adoptitaj en la rusan lingvon, tie fariĝas *g*. Kelkaj ekzemploj: harmoniko—garmonika; harpuno—garpun; horizonto—gorizont; horoskopo—goroskop; humo—gumus; husaro—gusar; alkoholo—alkogol.

Ĉi tio ja estas pli verŝajna, ke Zamenhof estis influita de la rusa lingvo, kiam li transformis la germanan *brühen* en la Esperantan *brogi*.

Ĉi tio tamen estas nuraj konjektoj, kiuj ne solvas definitive la problemon. Tial estus tre interese ricevi lingvistikan respondon de kompetentulo.

Birger Gerdman

NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO

de Louis Bastien, Akademiano
(nova, tute reviziita, eldono)

*Esperanta - Latina - Franca
Itala - Hispana - Portugala
Germana - Angla - Rusa*

317-paĝa, bele presita kaj bindita
Prezo 12ŝ. 6p., aŭfranko 6p.

Eldonita de E.P.C., Ltd.

Mendu ĉe U.E.A.,
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.)

Kio estas via V.-K.?

Respondoj (vidu p. 87)

1. **Aŭtokrato** estas absoluta regnestro.
2. **Impeti** signifas fervore aspiri al celo.
3. **Agariko** estas manĝebla fungo.
4. **Ŝovinisto** estas fanatika patrioto.
5. **Farĉo** estas hakita kaj spicita viando aŭ legomaĵo.
6. **Aŭguro** estas antaŭsigno.
7. **Graco** estas spirita helpo de Dio.
8. **Konkordo** estas harmonio inter pluraj personoj.
9. **Siroko** estas varmega vento ĉe Mediteraneo.
10. **Slojdo** estas manlaboro kun eduka celo.

Nia felietono :

La Alaska Stafeto

F. Omelka

III. Propono

DOKTORO WELCH iris al la fenestro kaj fikse rigardis en la malluman nokton. Liaj fingroj maltrankvile tamburetis sur la fenestrotabulon. El lia pala vizaĝo oni povis scii, kiel febre li ion pripensas.

Komuniku, kion pri ĝi.

Kiel kruela ĝi estas, kaj kompatinda samtempe ! Je distanco de kelkcent kilometroj kuŝas la paketo, kiu por ilia urbo signifas vivon. Se oni ne alveturigos ĝin ĝustatempe, dekoj da homoj—infanoj kaj plenkreskuloj—senpove pereos. Kaj li vizitados unu pacienton post la alia, li rigardos en iliajn brilantajn okulojn, li donados al ili injektojn, kies efiko rapide malaperos, kaj je ĉiuj demandoj li devos nur levi la ŝultrojn kaj per rompita voĉo respondi: “Sed jes estas sufiĉe da sero kompreneble ĝi estas en Nenana. Kion pri ĝi ?”

Por kio estas ĉiuj eltrovaĵoj de la moderna tekniko, se ili ne povas helpi tie, kie temas pri savo de homaj vivoj ? Por kio estas aŭtomobiloj en tiu ĉi terura lando ? Por kio estas la aeroplanoj meze de polusa vintro ?

Kaj en liajn pensojn komencis ŝteliĝi io kiel amara riproĉo. Kial li loĝiĝis en tiu ĉi lando, forgesita de Dio kaj homoj, en tiu ĉi mizera urbo, kiu estas la lasta civilizita loko sur la amerika kontinento. Kiel facilan kaj komfortan vivon havas homoj vivantaj en la sudo ! Tie sufiĉus nur voki per la telefono kaj post kelkaj horoj estus la sero en la manoj de la kuracisto. Kaj ĉi tie ?

Sed subite li rekonsciiĝis. Li ekhontis pri tiu ĉi momenta malforteco. Ne, ne—la vera viro ne parolas tiamaniere. Plendi povas nur malbravuloj. Riproĉi la sorton pro ĝiaj malfavoro kaj malico povas nur homoj de etaj koroj. La vera viro ektimas neniun malhelpaĵon. Kaj ju pli da ili li renkontos survoje, des pli kuraĝe li ekmarŝas, li batalas kaj venkas !

Li forpaŝis de la fenestro kaj lia rigardo glitis al la biblioteko. Li malfermis la tirkeston kun geografiaj libroj kaj momenton li serĉis ion en ĝi, sed sensukcese.

“Silvio, ĉu vi prenis de ĉi tie landkartaron ?”

“Mi havas ĝin, patro,” diris Georgo.

“Ho—vi ankoraŭ maldormas ? Iru jam dormi, kaj ankaŭ vi, Silvio !”

“Kaj kion vi respondos al ili ?” demandis sinjorino Welch, kiu intertempe tralegis la telegramon kaj nun kune kun Georgo studis landkarton de Alasko.

“Mi ankoraŭ ne scias,” respondis la kuracisto. “Sed mi devas solvi la problemon, kaj tuj. Permesu, Georgo !”

Li ja konis detale la landkarton de Alasko, sed li tamen volis plivigligi la memoron per rigardo en la landkartaron.

Momenton li atente rigardis la cirkletojn, kiuj indikis la urbojn kaj vilaĝojn situantajn inter Nome kaj Nenana. Poste li prenis la cirkelon kaj liniilon kaj mezuris distancojn inter la unuopaj lokoj. Sed li ne povis solvi la problemon kiel ajn ; senĉese li skuis la kapon.

“Ĉu ne estus eble aranĝi iun ekspedicion el Nome, kiu veturu tien ?” ekhavis ideon sinjorino Welch. “Eble ni trovus kelkajn virojn, kiuj provus tion.”

“Neeble ! Ke ni trovus tiajn virojn, pri tio mi ne dubas. Sed kiel longe daŭrus la veturo ? Kaj dume kiom da homoj mortus !”

“Aŭ se oni forsendus el Nenana la motor-sledo !” ekbrilis la okuloj de Georgo.

La kuracisto ekridis kaj karesis la filon per amplena rigardo.

“Vi ja ankoraŭ ne scias, Georgo, kio estas Alasko. Jes, se ĝi estus bela ebenaĵo, sur kiu troviĝus neniu malhelpaĵo—kial ne ? La motor-sledo certe estus ĉi tie plej baldaŭ. Sed ĉu vi povas imagi al vi, kio atendas la veturanton en tiuj ĉi dezertaj kaj perfidaj regionoj ? Se ne estas eble uzi la aeroplanon, tiam restas nur unu komunikilo. Kaj tio estas—”

“La hunda kunjungaĵo !” interrompis lin Georgo.

“Jes. Kaj tiu, kiu gvidos ĝin, devos havi nervojn kiel el ŝtalo, okulojn viglajn kiel ĉe falko, li devos esti elasta kiel ligno kaj rapidmova kiel cervo. Kaj li devos tre bone koni la regionon, ĉar alie li certe voĵeraros kaj pereos.”

Ĉiuj eksilentis. En la ĉambro regis premanta silento. Nur la pendolo de la horloĝo en egalaj intervaloj forkalkulis la sekundojn, kiuj rapide ŝanĝiĝis en minutojn, el kiuj ĉiu rememorigis al ili la krudan realon.

Georgo suprenlevis la kapon kaj rigardis al la patro. Li vidis lian zorgoplenan vizaĝon, lacajn okulojn—kaj subite li eksentis tiom da kompato pri la patro, ke li ne povis resti sur unu loko. Li leviĝis kaj iris tra la ĉambro tien kaj reen. Ĉu estas vere nenia helpo ? La malbenita paketo ! Ĝi restos en Nenana—kaj poste iu ankoraŭ povos riproĉi la patron, ke li ne scipovis aranĝi la transporton !

Pri la transporto entute eĉ ne temas. Ja ekspedicion, kiun proponis la patrino, oni povus forsendi rekte el Nenana—oni ja ŝparus unu vojon. Sed grava estas rapideco kaj tempo ! Kio helpus al la patro, se li ricevus la seron nur post unu monato ! Nun estas necese agi rapide. Kun la paketo oni devas veturi kiel en vetveturo, kaj—se necese—transdonadi ĝin unu al la alia, sen ia paŭzo, sen ia ripozo, tiel, kiel ili faris antaŭ nelonge en gimnastika horo—kaj tiumomente Georgo subite haltis.

Li saltis al la patro, pendigis sin ĉirkaŭ lia kolo kaj ĝoje ekkriis :

“Paĉjo, mi jam scias !”

“Kion ?”

“Mi scias, kion ni faros kun la paketo ! Bonege ! Bonege ! Ĝi certe sukcesos !”

“Do—kion ?” la patrō ne komprenis.

Ankaŭ la patrino scivole rigardis la knabon, kies vizaĝo radiis pro ĝojo.

“Ili aranĝu stafeton !” ekkriis Georgo kaj triumfe rigardis la surprizitajn gepatrojn.

“Stafeton ? Kiel ?”

“Nu, rigardu !” Georgo montris la landkarton kaj vigle klarigis sian ideon : “Unu kunjungaĵo veturos el Nenana, ĉu ne. Ĝi alveturos al Tolovana kaj tie atendos alia viro kun nova kunjungaĵo. La tria estos en Hot Springs, la kvara denove aliloke—mallonge dirite ĉie, kie survoje el Nenana kun ni ekzistas telefona komunikiĝo. Ĝi estas stafet-veturo en granda mezuro—faru tion, paĉjo !”

Doktoro Welch subite plivigliĝis. Ĉiu laciĝo estis for. Unue li ĵetis longan rigardon al sia edzino. Poste li rapide leviĝis ĉirkaŭbrakis la filon kaj kisis lin.

“Jen, Georgo tion oni nomas—doni konsilon ĝustatempe. Do, stafeto Ke mi ne ekhavis tuj la saman ideon ! Ĝi ja estas vere la sola ebleco”

Li surmetis la peltmantelon.

“Kien vi iros ?” demandis sinjorino Welch.

“Al la poŝtoŝtacio. Mi devas sciigi ilin pri mia decido.”

“Sed ĉu ne estus eble fari tion morgaŭ matene ? Denove vi ne dormos.”

“Nenio alia restas. Morgaŭ matene ĉiuj lokoj devos esti sciigitaj, pri kio temas.”

“Ĉu ĝi sukcesos, paĉjo ?” ĝojkriis Georgo.

“Certe ! Mi kredas, ke ni trovos la homojn, kiuj konas sian devon. Kaj se ĝi sukcesos, ni estos savitaj !”

La horloĝo jam antaŭ longe finbatis noktomezon, kiam la kuracisto ekiris al la poŝto. Sed li iris facile, kvazaŭ li ne estus travivinta tagon plenan de tumulto, laboro kaj zorgoj.

Smith maldormis.

“Mi supozis, ke vi venos ankoraŭ dumnokte, sinjoro doktoro,” li bonvenigis la malfruan vizitanton.

“Nevolonte mi ĝenas vin, sinjoro Smith, sed—”

“Nenia ĝeno ! Mi faros kompleze ĉion por havi la seron ĉi tie kiel eble plej baldaŭ. Kompreneble, se tio estos nepre ebla.”

“Ĝi sukcesos, sinjoro Smith, ĝi certe sukcesos,” diris la kuracisto ĝojplene.

Kaj post duonhoro flugis en ĉiujn pli grandajn lokojn inter Nome kaj Nenana la alarmanta alvoko :

“Aranĝu stafeton, kiu alveturigos la seron en minacitan Nome. La raporton pri la aliĝintaj viroj sendu tuj al Nome kaj al Nenana. Doktoro Welch.”

Kiam la kuracisto forlasis la poŝtoŝtelojn, ĉirkaŭis lin la nepenetrebla mallumo. Ĝi estis la mallumo, el kiu grimacas la morto. Sed nun li jam ne timis ĝin.

Ĉu venkos la vivo ?

Vere, malfacile respondi, kiam la decida lukto ankoraŭ ne komenciĝis. Sed sufiĉas, ke estis donita ordono al la atako. Jam ĉi estas la vivo kaj la forto.

Kaj sur la vizaĝo de doktoro Welch aperis esprimo de firma decidemo.

(*dŭurigota*)

Averto !

Korespondanto—FD de U.E.A.—atentigas pri ofta peto ĉe delegitoj de la Asocio. Temas pri personoj, kiuj petas sendadon de varoj k.s. plejparte neakireblaj en la lando de la petanto. Nia korespondanto skribas : “Kiam diversaj landoj havas naciajn leĝojn por limigi internacian komercon pro malfacilaĵoj de egalaj valoroj de naciaj monsystemoj, tiuj homoj, kiuj profitas per kontraŭleĝaj privataj interesanoj, estas laŭ la oficiala vidpunkto, krimuloj.” La skribanto diras, ke se privata homo bezonas malgravan objekton en alia lando por sia privata uzo, kaj aranĝas interesanĝon sen komerca profito aŭ simile, tio almenaŭ estas pardonebla ; sed kiam temas pri akiro de maŝinaj partoj k.s. por metiisto aŭ profesiulo, tio estas simpla krimado.

Por nia movado tio estas grava. Tia negocado ne nur estas danĝera por la individuo, sed ĝi donas al registaroj kaj aliaj oficialaj instancoj bonan kaj validan motivon persekuti aŭ eĉ malpermesi Esperanton kaj ties movadon.

Estas dezirinde, ke ĉiu samideano zorge pripensu tiun aspekton de negocado, kiu povus supraĵe aspekti bagatela.

Lastaj informoj

Hamburga Esperanto-tago : Por vojaĝantoj al la U.K. en Munkeno, la Hamburga grupo aranĝas restadon kaj programon. Oni sin turnu al : Hamburga Esperanto-societo, Isestr. 79, Hamburg 13, kiu donos ĉiujn informojn.

Belga Kongreso : La 36-a Kongreso de Reĝa Belga Ligo Esperantista okazos en Bruselo dum Pentekosto. Petu informojn de : R.B.L.E., 19 Avenue Montjoie, Bruselo, Belgujo.

Internaciaj Someraj Kursoj sub aŭspicoj de L.E.E.N. kaj Fl.L.E. okazos en Soesterberg, Nederlando. Informojn ĉe : C. B. Zondervan, Sweelinckstr. 2, Deventer, Nederl.

Unesko : *Unesco Features*, informorgano de Unesko, anoncas, ke la Hinda Registaro, kiel parton de sia programo por plifaciligi scian esploradon, komisiis komitaton de sciencistoj kaj filologoj, kies tasko estos normigi sciencajn terminojn por ĉiuj Hindaj lingvoj. La komitato starigos principojn por la enkonduko de internaciaj sciencaj terminoj en la multajn lingvojn de Hindujo kaj ankaŭ decidis pri novaj terminoj kiam ajn fremdaj vortoj ne povas esti prenataj rekte en Hindan lingvon. La registaro tiel agis por malhelpi la kreskadon de diversaj sciencaj terminoj en la diversaj lingvoj.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 235

2-an Februaron 1951

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Januaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1950 :

	1950	1951
Asociaj membroj	2148	1945
Individuaj		
membroj :		
MJ	316	376
MA	2121	2405
MS	186	183
Patronoj ..	12	14
DM	193	208
HM	56	58
	— 2884 —	— 3244 —
	5032	5189

DELEGITOJ

Belgujo

Bruxelles. FD (Ekonomio politika) : F. Swinne, 77 rue de Nieuwenhove, Uccle-Bruxelles.

Brazilo

São Paulo. FD (Lingvoj) : Wanderley F. Gonçalves, Escola Preparatória, Rua da Fonte 91. Tel : 61352.

Britujo

Stafford. FD (Religio) : Pastro E. N. Thomas, paroĥestro, 18 Tithebarn Road. Tel : 251.

Finnlando

Lauritsala. FD (Junularo) : Juho Pyykönen, Lapvesi.

Mellilä. D : Toivo Ojanen, Kangas.

Francujo

Romorantin (Loir-et-Cher). D : F. Gomez, 3 Rue de la Pierre.

Saint-Cloud. FD (Filatelo) : vakas.

Versailles. FD (Turismo) : F-ino S. Minault, 3 rue Pierre Corneille.

Italujo

Trento. D : A. Fracalossi, Via Grazioli 29.

Izraelo

Jerusalem. FD (Turismo) : J. Genadehofer,

ĉe Parha Mizrahi, Stairs Str., Nachlat Achim.

Yavneel. D : Otto Koen, Mahane-Avoda (Bet-Olim).

FD (Librobindado) : La D.

Kanado

Windsor. D : vakas.

Saarlando

Bildstock. D : J. Schenkel, Trenkelbachstr. 10. Tel : Sulzbach 2381.

Sud-Afriko

Kimberley. FD (Inĝenieraj aferoj) : vakas.

Umtata. D : H. de Jong, 83 Sutherland St. Tel : 58.

Svedlando

Arboga. D : F-ino Margit Berggren, Ekhult. Tel : 309.

Nybro. D : S-ino L. Edsenius, Vilhelmsgatan 2. Tel : 744.

Stockholm. FD (Sporto) : vakas.

Visby. FD (Poŝto) : B. Löfqvist, Norrbackagatan 11.

Svislando

Biel. D kaj FD (Poŝto) : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

D-ro A. R. Johns, New York, Usono

H. W. Holmes, London, Anglujo

S-ino N. A. Holmes, London, Anglujo

D-ro C. J. Adcock, Wellington, Nov-Zelando

PATRONOJ 1951

10. Baptista Conceição, A., Coração de Jesus, Brazilo

11. Blacklock, S-ino A. L., Ipswich, Anglujo

12. Gillett, S-ino M. C., Banbury, Anglujo

13. Toms, C. H., Freshwater, Anglujo

14. van der Lijn, G., Uccle, Belgujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

126. Lynch, J., Dundee, Skotlando

127. Jenson, A., Oslo, Norvegujo

128. Cuené, M., Meknés, Maroko

129. Chapman, J. L., West Palm Beach, Fla., Usono

130. Ferree, D-ro G. P., Mill Hall, Pa., Usono

131. Rouleau, W. G., Washington, D.C., Usono
132. Sumner, F. H., Tillamook, Ore., Usono
133. Jobbins, F-ino A. F., Tunbridge Wells, Anglujo
134. Aleman Ruiz, D-ro A., Habana, Kubo
135. Antunes Prates, J., Coração de Jesus, Brazilo
136. Azeredo Coutinho, D-ro L., Belo Horizonte, Brazilo
137. Barbosa Barbedo, S-ino Z., Rio de Janeiro, Brazilo
138. Caetano Coutinho, A., Rio de Janeiro, Brazilo
139. Carvalho, D-ro J. de, Coração de Jesus, Brazilo
140. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo
141. Varanda, J., Petropolis, Brazilo
142. Lafetá Rabelo, H., Coração de Jesus, Brazilo
143. Macedo, J. A. de, Coração de Jesus, Brazilo
144. Macedo, R., Coração de Jesus, Brazilo
145. Mattos, L. de, Coração de Jesus, Brazilo
146. Melesio de Paula, S-ro, Periperi, Brazilo
147. Moreira, J., Rio de Janeiro, Brazilo
148. Soares de Araujo, G., Rio de Janeiro, Brazilo
149. Timponi, D-ro M., Rio de Janeiro, Brazilo
150. Veado, D-ro W., Coração de Jesus, Brazilo
151. Campbell, A. R., Belfast, Irlando
152. Bellatti, S., Battle, Anglujo
153. Coventry, W. H., Harpenden, Anglujo
154. Cunningham, W., West Wemyss, Skotlando
155. Gayfer, W. T., Cleethorpes, Anglujo
156. Harris, F., Bath, Anglujo
157. Hoyle, J., Rochdale, Anglujo
158. Langham, W., Iver, Anglujo
159. Millidge, Pastro R. G., Sutton, Anglujo
160. Shuttleworth, S-ino A. P., Southport, Anglujo
161. Turton, G. H. A., Huddersfield, Anglujo
162. Young, K. J., North Cheam, Anglujo
163. Ling, E., Trollhättan, Svedujo
164. Dusausoý, J., Paris, Francujo
165. Gomez, F., Romorantin, Francujo
166. Guillaume, J., Le Vesinet, Francujo
167. Mila, E., Drancy, Francujo
168. Malmgren, E., Stockholm, Svedujo
169. Söderberg, K., Uppsala, Svedujo
170. Baker, C. A., Exeter, Anglujo
171. Berry, F-ino E., Haslingden, Anglujo

172. Dickson, S-ino E., Letchworth, Anglujo
173. Ison, F-ino H. M., Ardleigh, Anglujo
174. O'Dell, J. D., Lincoln, Anglujo
175. Sinclair, F-ino P. C., Buckhaven, Skotlando
176. Squire, F-ino E., West Hartlepool, Anglujo
177. Strapps, F-ino P., Ilford, Anglujo
178. Wilford, F-ino N., Nottingham, Anglujo
179. Wright, R. E. S., Cheam, Anglujo
180. Kushlick, I., Johannesburg, Sud-Afriko
181. Boffejon, H., Antwerpen, Belgujo
182. Harding, R., Umtali, Suda Rodezio
183. Thollet, C., Port Lyautey, Maroko
184. Tronchon, H., Casablanca, Maroko
185. Hoekma, A. G., Den Haag, Nederlando

DONACIOJ. K. Wilgenhof 6ŝ., F-ino I. M. Cochrane 2ŝ. 6p., C. M. Houghton 10ŝ., F-ino A. B. Holness 5ŝ., G. L. Preedy 12ŝ. 6p., C. T. Birch 5ŝ., W. C. Lewis 2ŝ. 6p., H. Bridger 11ŝ. 3p., T. Woolfenden 2ŝ. 6p., W. McCallum 5ŝ., E. Collins 3ŝ. 6p., S-ino V. Reed 10ŝ., F-ino S. V. Reed 10ŝ., R. Robbins 7ŝ. 6p., S. Kriss 3ŝ., J. E. Pedraz 20ŝ., E. Mila 4ŝ., S. Zamir 7ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Bassols, S-ino Dolors, edzino de konata samideano Jacint Comella, Esperantista pioniro en la kataluna urbo Vich, 31 jan. 1951.

Klauss, S-ro Johannes, 68-jara, en Hamburg, Germ., 14 jan. 1951.

Puppo, S-ro Antonio, en Varazze, Italujo, 6 jan. 1951, 59-jara. VD kaj FD de U.E.A., aktiva propagandisto; fondis la lokan grupon kaj organizis la italan nacian kongreson 1949.

MARISTA TERMINARO

Komandanto Peter Clissold
1ŝil. 6p. aŭ 5 respondkuponoj
Mendu ĉe U.E.A.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Antonio Pastor, Ercilla, 43, 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondas.

Hispana fraŭlino, 21-jara, korespondos ĉiulande, interŝ. pm. kaj pk. Ana Moreno Barris, Entenza 131, Barcelona, Hispanujo.

Internaciema anaro de Protestanta dimanĉlernejo deziras starigi amikajn rilatojn Kristanajn kun anaroj de dimanĉlernejoj kaj preĝejoj ĉiulandaj. Ĉu vi volas interŝanĝi Kristanajn salutojn kun ni? Skribu al F-ino Ailsa Dudden, 19 Austin Drive, Manchester 20, Anglujo.

AAAAAAAAAlt ! Legu Jarlibron pĝ. 55.

Turisma Servo : Rezervas malmultekoste hotelĉambrojn en okcident-Eŭropo, prizorgas gvidadon, turismajn prospektojn (afranku filatele). Loeckx, Konijnenperken 109, Brussel-Bosvoorde, Belgujo.

Mi deziras il. pk. aŭ uzitajn pm. el ĉiuj landoj por miaj genevoj. Bonvole skribu al Roger Coe (11-jara,) 3 Kipling Road, North End, Portsmouth, aŭ F-ino Ann Beckwith (10-jara), 5 Cardiff Road, North End, Portsmouth, Anglujo. Mi dankas vin kaj nepre respondos.

La Esperanto-Societo de Manchester okazigos poŝtkartkunvenon fine de marto. Sendu salutojn k.t.p. grandnombre, ni petas. Adresu al S-ino Playfair, 12 Torbay Road, Urmston, Manchester, Anglujo.

Marsol, instruisto, Lapalme (Aude), Francujo, por ekaprila ekspozicio deziras ĉiuspecajn fordonatajn elmontraĵojn el ĉiuj landoj; antaŭdankon. Ankaŭ petas tutmondajn gekorespondantojn.

La Dokumenta Servo de Nederlanda Centra Komitato Esperantista tre volonte ricevos katalogojn aŭ listojn de Esperantofakoj ĉe diverslandaj bibliotekoj. Adr. : Preangerstr. 35, Enschede, Nederlando.

Pastro deziras korespondi kun pastroj en aliaj landoj, nepre nur Esperante, pri ia ajn temo. Pastro E. N. Thomas, 18 Tithebarn Road, Stafford, Anglujo.

Ĉinaj gejunuloj skribu grandnombre al hungara metallaboristo, 25-jara. Alexander Kassai, Lillångsgatan 21, Bromma, Stockholm, Svedujo.

S-ro Walter Semsch, Pihel 187, okr. Novy Bor, Ĉeĥoslovakujo deziras interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj leterojn kun la tuta mondo. Respondo garantiata.

Fromaĝofaristo deziras korespondi nur pri la fabrikadmetodoj de diversaj specoj de fromaĝo. En la lingvoj Angla kaj Esperanto. S-ro Jan Zegel, Oude Schild 258, Texel, Nederlando.

S-ro J. J. Plácido kaj A. M. Piteira, Arraiolos, Portugalujo, interŝanĝas pm. kaj pk. kun tuta mondo. Kontraŭ 50 pm. sendos la saman kvanton.

Salutpoŝtkartoj petataj por klubeto partoprenanta en lerneja ekspozicio, en Majo 1951. N.C.H. Lernejo, Farnborough, Hants., Anglujo.

Metalajn ŝlosilojn malnovajn ĉiaspecajn ĉiulandajn kolektas Giuseppe Crippa, Via Pomo 10, Milano, Italujo. Sendu proponojn kaj priskribojn; aĉetas aŭ kontraŭŝanĝas varojn.

Kvar valorajn jubileajn Esperanto-poŝtmarkojn ricevos ĉiu Esperantisto kaj filatelisto sendante 7 int. respondkuponojn al S-ro Bencion Danon, kibutz Afikim, Izraelo, inkluzivas afrankon aerpoŝte.

Por propagandi nian lingvon sendu al mi Esperantajn poŝt-stampojn el ĉiuj landoj. Interŝanĝe vi ricevos hispanajn pm. aŭ poŝt-stampojn, laŭ deziro. Ramon Molera, Calle Hospital 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Koregan dankon al ĉiuj gesamideanoj sendintaj salutojn k.t.p. al nia varb-ekspozicio. Ĝi estis granda sukceso. Hans Raab, Austrasse 84, Nürnberg 7, Germanujo.

Nord-Norvegujo. 50 diversprofesiaj (junuloj kaj mezjunuloj) kursanoj de T. Morariu en Bodø deziras korespondi kun la tuta mondo. Respondo garantias Bodø Esperantoklubo, Urtegårdsgata 26, Bodø, Norvegujo.

Deziras korespondi (kun geinstruistoj en metiaj kaj industriaj lernejoj) pri fakinstruado, kondiĉoj por lernantoj kaj instruistoj, kaj similaj demandoj: Harry Eklund, Sköntorpsvägen 18 (I), Johanneshov, Svedujo.

Cambridge Universitata grupo deziras kontakti studentojn, kaj individue kaj grupe, por korespondi. Skribu al la sekretario, Ian Leslie, St. Catharine's College, Cambridge, Anglujo.

ALLOGAJ NOVAJ LIBROJ

		ŝ.	p.
Ariel. José Enrique Rodó (M. Fernández Menéndez)	.. broŝ.	6	6
Filozofio de la idealismo			
La unua esperanta libro eldonita en Urugvajo			
Burĝonoj. Vilho Setälä	 bind.	15	0
Infanoj en fotografo kaj poezio ; tre bela libro			
La 13a mortis. L. Vetter (H. Borschert)	.. bind.	11	6
Kriminala romano kun scenejo en Svedlando			
Elementoj latinaj en Esperanto. Fr. Modrijan	.. broŝ.	2	0
Helsinki : lumo kaj ombro..	.. bind.	18	6
Premiitaj fotoj kun Esperantaj tekstoj ; belega libro			
Inter Sudo kaj Nordo. Ferenc Szilágyi	.. bind.	12	6
Originala novelaro de la konata aŭtoro			
Kiso de la Reĝino. I. F. Naĵivin (D. Staritsky)	.. broŝ.	3	9
Aventuroj en la Kongo (Ėpoko-libro n-ro 10)			
Kredu min, Sinjorino ! Cezaro Rossetti	.. bind.	10	6
Spertoj de eksponisto			
Malsato en Riĉa Rikolto. S. Tokunaga (K. Nakagaki)	.. broŝ.	1	9
Rakonto el Japanujo			
Marista Terminaro. Komandanto P. Clissold..	.. broŝ.	1	6
Represo de la du partoj en unu volumeto			
Miru, Pensu, Ridu ! Paul Bennemann	.. bind.	10	6
La ideala libro por la grupo			
Misteroj de l'Vivo. A. Bøgh-Høgsted (C. Graversen)	.. broŝ.	4	9
Ĉarmaj noveloj pri tipoj en Danlando			
Naŭlingva Etimologia Leksikono. L. Bastien..	.. bind.	12	6
Retoriko. Prof. D-ro Ivo Lapenna	.. broŝ.	10	0
Kun aparta konsidero al Esperanta parolarto			
Sveda Novelaro. Tradukis F. Szilágyi	.. bind.	9	0
20 noveloj de nuntempaj verkistoj laborist-tendencaj			

Aldonu 10% por aŭfranko

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

